

1980 novembro

73-a jaro

n-ro 899(11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Ĝenerala Konferenco de Unesko, p. 182

Vi trovos

sur la apuda paĝo tute spritan tekston de la ĝenerala direktoro de UEA pri tre serioza temo — la baldaŭa aŭtomatigo de la asocia administrado. Ne rifuzu legi tiun tekston simple pro ĝia titolo kaj via penso "Mi ne interesigas pri la 'administrado'". Ĝenerale, liberigu de tiaj titolaj antaŭjuĝoj. Legu la tekston de V. Sadler kaj vi vidos, ke ĉi tiu konsilo estas ĝusta. Cetere, kiam ni gratis la nukon ĉi-matene kaj provis elkovi kelkajn vortojn pri la ĉi-numera artikolo pri la baldaŭa komputilo de UEA, sieĝis nin poemo ia subite. Ni legis ĝin antaŭ trideko da jaroj. La poeto verkis ĝin antaŭ alia trideko da jaroj. Se ni jam havus la komputilon, ĝi verŝajne kapablus diri al ni amason da detaloj pri la poemo kaj poeto. Ni nur konjektas, ke la poemon verkis Anatolij Mariengof, iam en la komencaj jardekoj de ĉi tiu jarcento. La versoj, kiuj restis enkape, tekstas jene (en trama traduko, sen la originalo): "Rapidu knabinoj kaj damoj folaj / amu poetojn arde ĝis eksceso / sociaj valoj ni estas la solaj / kiujn ne inundis jam la progreso." Tolja Mariengof, se temas pri li, ne povis supozi, ke ankaŭ komputiloj fariĝos poetoj. Ha! Kiam ni havos la komputilon, en vesperaj horoj, ni en la Oficejo povos lasi ĝin verki eĉ niajn amleterojn. Ĉu ne mirinde? Aŭ, ĉu pripensinde? Havu ankoraŭ ne-programitan saluton ĉi-foje!

Enhavo

- 181 Administrado: Kion portos la aŭtomatigo al UEA? (Victor Sadler)
- 182 Oficiala komunikado de la Akademio: Malaprobo de reformoj
Ĝenerala Konferenco de Unesko: Pretigi la grundon por nova elpaŝo kun grava propono (Tibor Sekelj)
- 184 Informado: Felietono kaj polemiko (S. Milojević)
- 186 Pupteatra Internacia Festivalo: Pupoj kaj aplaŭdoj (Mika Waseda)
Virina agado: Semajnfino EVA
- 187 Belartaj Konkursoj 1980, Originala prozo: Unua premio: Ho mia kor' (V.A. Glazunov)
- 191 Recenzoj: "El ĉina poezio" de S.J. Zee (Leopold Knoedt); "Kiel diri? Praktika Esperanta frazeologio" de L. Lentaigne (Koiĉi Ŝimizu); "La amo de Danto Alighieri" de T. Müller (Peter Rados); "La dia avarulo" de J. Dobraczyński / B. Monkiewicz (W. Krikke); "Enkonduko al literatura kritiko" de G. Silfer (Probal Daŝgupto); "Karnavalo en Rio" de S. Chaves (Wouter F. Pilger)
- 194 TEJO-Paĝo: 24a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo: Kien por la jarfino?; Renkontiĝo en Belgio: Ĉefe pri muziko (A. B.)
- 195 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 196 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 198 Nekrologoj (Eŭgeno Aisberg, H. Bourdelon, M. Genevoix, P. Heinrich, Jorge Hess, K. Jensie, I.P. Kingma, I.T. Maddern, J. Matasin, J. Schenkel, O.A. Stein, F. Tichý, C. Tingle)
Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 199 Ekzameno E (Bernard Golden)
- 200 Anoncetoj; Anonco

La kovrilo

Unesko, kiu nian titolon enestas, denove konferencis pri la mondo. Do ankaŭ pri ni, kiel integra parto de tiu mondo. Sonas eble troiĝe jubili kovrilpaĝe kaj sur la paĝoj 182 — 184 pri la fakto, ke la 21a Ĝenerala Konferenco en unu el siaj ĉefaj komisionoj pretis aŭskulti dekminutan pledon por Esperanto. Sed, se vi sekvas la evoluon de la eksteraj rilatoj de UEA, vi ne taksos tion surprizo aŭ troiĝo. Unesko ĉiam pli evidente prezentiĝas kiel la konscienco de la homaro. Estas eta triumfo, kiam ankaŭ Esperanto troviĝas tie kie oni ekzamenas tiun konsciencon. Kiel Tibor Sekelj montras en sia raporto pri la Konferenco, estis ŝajne facile proponi novan rezolucion favore al Esperanto, ĉar pozitive ŝanĝiĝis la klimato en Unesko. Tre saĝe tamen estis ne rezolucii sen preparoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro:

33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj, edukado kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Kion portos la aŭtomatigo al UEA?

ĈU VI MEMORAS la skribmaŝinon? . . . tiun bruan aparaton, en kiun oni devis mem enigi la paperon, ĉe kiu oni devis mem korekti la erarojn per viŝilo aŭ per blanka inko? . . . tiun krudan mekanikaĵon, kiu eĉ ne kapablis memori, kion oni skribis per ĝi? Oni vere devas demandi sin, kiel la homoj eltenis labori per tiaj maŝinaĉoj!

Supozeble tiaj frazoj estos aŭdeblaj en la oficejoj de UEA post nur deko da jaroj — tute same, kiel en miloj da aliaj oficejoj tra la mondo. La oficeja revolucio jam okazas! Neeviteble, ankaŭ UEA kaptiĝas en ĝia sturmo. La elektroniko, kiu en nura jardeko ŝanĝis multekostajn mekanikajn kalkulmaŝinojn al senvaloraj antikvaĵoj kaj ŝtopis multe pli kapablajn kalkulilojn en la poŝon de simplaj lernejoj, nun trabalaas la oficejojn kaj administrejojn, la redaktojn kaj presejojn, la bibliotekojn kaj librovendejojn, traktante same fulmrapide la vortojn, la adresojn, titolojn, artikolojn kaj aliajn informojn, kiel ĝi jam traktas la ciferojn.

UEA jam en 1979 faris la decidon aŭtomatigi sian Centran Oficejon. Komputilo estos instalita en februaro 1981, kaj programisto jam de kelkaj monatoj laboras por prepari la terenon. Kompreneble, ni ne tuj aŭkcios niajn skribmaŝinojn, sliparojn kaj kartotekojn. Dum sufiĉe longa periodo la malnovaj sistemoj devos plu funkcii paralele kun la novaj, ĝis ili ne plu havos utilon. Tiam, kiel aspektos la tuto?

Nun, la stokoj de informoj, de kiuj dependas la tuta funkciado de UEA, troviĝas dise tra la Oficejo. La membrosliparo troviĝas en unu ĉambro, la financaj arĥivoj en alia, la libroserva kartaro en alia, kaj tiel


plu. Se la kontistino bezonas aktualan informon el la libroservo, ŝi devas telefoni aŭ eĉ iri tien. Eĉ kiam la bezonataj informoj estas en la sama ĉambro aŭ eĉ ĉe la propra skribotablo, oni plej ofte bezonas konsiderindan tempon por traserĉi la sliparon aŭ kartaron kaj transskribi aŭ kopii la informojn.

La esenca diferenco post la aŭtomatigo estas, ke ĉiuj gravaj informstokoj — la adresaroj, la kontoj, la tuta enhavo de la librokatalogo, la tekstoj de cirkuleroj ktp. — troviĝos en unu centra loko: en la memoro de la komputilo. La oficistoj, en siaj diversaj ĉambroj, sidos ĉe la finoj de la komputilaj "tentakloj", ekipitaj per klavaro kaj televidekrano. Pere de tiuj "terminaloj" ili havos ĉiujn informojn je sia tuja dispono kaj povos komunikiĝi ne nur kun la komputilo sed ankaŭ unu kun alia. La komputilo mendita por la CO havas tian kapaciton, ke ĉiuj oficistoj povos samtempe uzadi ĝin, sen ke tio kaŭzu ĝenojn aŭ rimarkeblajn prokrastojn. Unu komputila "presilo" (skribmaŝino) povas aŭtomate eltajpi la rezultojn de ilia laboro pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj oficistoj kune, samtempe tajpante je sia plena rapideco.

UEA jam ne pioniras la aŭtomatigon en la Esperantomovado. Komputiloj jam estas instalitaj ĉe Esperanto-asocioj en Usono, Britujo kaj Brazilo. La kongresa libroservo en Stokholmo estis komputile administrata. La Grafika Centro de UEA en Antverpeno jam profitas el komputila helpo, kvankam ne de propra maŝino. Iom post iom, estos eble interligi tiujn maŝinojn telefone, tiel ke, ekzemple, la listo de la britaj membroj de UEA povos esti rekte transprenita el la komputilo de BEA en Londono en la memoron de la maŝino en Roterdamo.

Por la laboro de UEA, la aŭtomatigo signifas unuavice ŝparon de tempo kaj laboro kaj eliminon de homaj eraroj. Ŝparojn oni atingas ne nur per tio, ke la informoj estas pli rapide troveblaj kaj prilaboreblaj, sed ankaŭ per tio, ke oni evitas duplikatan laboron. Ekzemple, unufoja enigo de ies adreso en la memoron sufiĉas, por ke ĝi estu ĉiam aŭtomate eltajpebla, ĉu por kongresa libro, por ekspedo de revuo, por sendo de letero, por la delegita adresaro, por librosendaĵo aŭ iu ajn alia celo. Tio en si mem jam eliminis multajn homajn erarojn, kiuj aperas ofte ĉe kopiado de informoj. Aliaj eraroj plej ofte rezultas el forgeso. Se oni unu fojon instruas al la komputilo, ke la kompatindaj nederlandanoj devas pagi imposton, aĉetante librojn ĉe nia libroservo, ĝi neniam forgesos alkalkuli tion al la fakturo.

Rapidigi la administran laboron kaj liberigi la homojn de tedaj, rutinaj taskoj, signifas doni al ili kvazaŭ plurnajn ekstrajn horojn en ĉiu tago: tempon por pli interesa, krea laboro. La aŭtomatigo signifos por UEA



unue: multe pli bonan utiligon de la homaj talentoj, kiujn ĝi disponas. Due, ĝi malfermas perspektivon de multe pli efika uzado de la informoj kaj, sekve, pli bona servado al la uzantoj de Esperanto. Eta ekzemplo: se iu membro telefonas al la CO por demandi pri la havebleco de difinita libro, ĉiu ajn oficisto povos tuj alvoki la deziratajn informojn sur sian ekranon kaj responde sciigi la ĝustan titolon, la prezon, kiom da ekzempleroj restas en la stoko, kiam nova stoko estas atendebla kaj tiel plu. Se iu aparte interesiĝas pri ĉiuj verkoj de Raymond Schwartz, aŭ pri la plej aktuala stato de la delegita reto en Kalifornio aŭ pri ĉiuj junaj membroj en Koreujo, sufiĉas instrukcii al la komputilo, ke ĝi elpresu la deziratajn informojn kaj adresu ilin al la informpetinto.

Fine, se mi verkus ĉi tiun artikoleon ĉe la ekrano anstataŭ ĉe tia primitiva elektra tajpilo, la komputilo povus en ĉiu momento precize informi min, kiom da **presitaj** linioj ampleksos mia teksto. Mi povus, per simpla retroiro, forviŝi miajn tajperarojn senpure anstataŭ per iksoj. Mi povus jam post ĉiu alineo aperigi la tekston ankaŭ sur la ekrano de la redaktoro, se li volus kontroli la progreson de la verkado. Se mi verkus paĝon por komencantoj, ĝi povus daŭre elkalkuli por mi ian mezuron pri la facileco de la teksto, ekzemple surbaze de la nombro de maloftaj vortoj kaj la longeco de la frazoj. Fine, kiam la redaktoro tamen insistos fari ŝanĝojn, sufiĉos entajpi nur la korektojn por ricevi el la presilo tute puran kaj kompletan manuskripton.

Kaj tiam — ĉu kredeble? — eble restos tempo eĉ por okupiĝi pri lernolibroj por hindoj aŭ scienca literaturo por Irano. . . .

V. Sadler

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO:

Malaprobo de reformoj

LA AKADEMIO de Esperanto notas kun forta malaprobo diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniuj ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u".

Oktobro 1980

Prezidanto: W. Auld

Sekretario: D-ro A. Goodheir

ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO:

Pretigi la grundon por nova elpaŝo kun grava propono

DE LA 23a de septembro ĝis la fino de oktobro, la 21a Ĝenerala Konferenco de Unesko kunsidis en Beogrado, okupante la salonegojn, amfiteatron, koridorojn kaj multajn ekspoziciejojn kaj oficejojn de la ĵus konstruita Sava-Centro. Inter la 3 500 partoprenantoj troviĝis la delegitaroj de 153 ŝtatoj-membroj, reprezentantoj de internaciaj registaraj organizaĵoj kaj 69 observantoj de 402 internaciaj neregistaraj organizaĵoj, kunlaborantoj kun Unesko. Krome, estis tie ĵurnalistoj, fotistoj, televidistoj. UEA ĉeestis pere de la subskribinto de tiu ĉi raporto.

La laboroj de la Ĝenerala Konferenco disvolviĝis en la plenkunsidoj kaj en la komisionoj pri: edukado, natursciencoj, sociaj sciencoj, kulturo kaj komunikado, administrado ktp. Nin interesas ĉefe la diskutoj en la Komisiono pri kulturo kaj komunikado, en kiu la ĉefaj temoj estis: la respekto al la homaj rajtoj; aprezo kaj respekto de alies kultura identeco; partopreno en la kultura vivo; artistaj kaj intelekta kreado; integra kampara evoluo; situacio de la virino kaj ŝia partopreno en la evoluo; konservado kaj valorigo de la kultura kaj natura heredaĵo; cirkulado kaj internacia interŝanĝo de informoj; proceso kaj rolo de la komunikado; politiko, infrastrukturo kaj instruado en la kampo de komunikado; sistemoj kaj priservado de la informado; aŭtoraj rajtoj.

Oni faris multajn konkludojn kaj decidojn, inter kiuj mi menciis nur la proklamon de la Jardeko de la Virino, dum kiu Unesko klopodos klarigi, unuflanke, la gravan rolon de la virinoj en la vivo kaj progreso de la popoloj, kaj, aliflanke, la subpremitan staton en kiu la virino ankoraŭ troviĝas en multaj socioj en la diversaj regionoj de la mondo, por pere de tio atingi la egalrajtecon de la virinoj kaj viroj.

Oni starigis normojn por la respekto al la libera evoluo de la lingvo kaj kultura identeco de ĉiuj etnaj grupoj, grandaj kaj malgrandaj. Aparta komisiono pristudas la eblecon redoni al la lando de la origino la kulturajn objektojn signifoplenajn por la identeco de iu popolo. Multa atento estis donita al la protektado, konservado kaj revalorigo de la kultura kaj natura heredaĵo de la homaro. Unesko kunmetis longan liston de kulturaj kaj naturaj monumentoj kaj belaĵoj, konsiderataj kiel heredaĵo de la tuta homaro, meritantaj prioritatan protekton.

Dum la Konferenco okazis la terura tertremo, kiu detruis la urbon El Asnam en norda Alĝerio. La Ĝenerala Konferenco en aparta plenkunsido decidis sendi tujan helpon per disponigo de fakuloj kaj unuamomentaj bezonaĵoj. Unesko ellaboros longdaŭran planon por helpi la rekonstruon de la urbo kaj normaligon de la vivo de la postvivantoj.

Aparta zorgo estis donita al la temo de la komunikado. Oni emfazis, ke apartenas al la elementaj homaj rajtoj la rajto informadi, informiĝi kaj esti informata. Sed oni devis konstati, ke en la praktiko multaj obstakloj malhelpas la plenan realigon de tiuj rajtoj.

Por pristudi tiun temon, 16-membra komisiono de Unesko, sub la gvido de la antaŭa irlanda ĉefministro kaj Nobel-premiito Sean MacBride, dum du jaroj laboris por resumi centon da rekomendoj en libron 360-paĝan, kiun Unesko eldonis en kelkaj naciaj lingvoj sub la titolo *Multaj voĉoj – unu mondo*. Kun sia pli populara titolo, "Raporto de MacBride", ĝi estis la bazo de longaj kaj fruktodonaj diskutoj en Beogrado.

En tiu diskuto ankaŭ la reprezentanto de UEA havis okazon paroli pri Esperanto dum plenaj dek minutoj. La interveno estis plene apartenanta al la diskutata temo.

La Raporto de MacBride sur la paĝo 60 de la franc-lingva eldono diras i.a. jenon: "La ĝeneraliĝo en la mondo de malgranda nombro da lingvoj kondukas al diskriminacio kontraŭ la aliaj lingvoj kaj al la kreado

**Sean MacBride,
kies raporto
pri la problemoj
de komunikado
fariĝis ĉeftemo
ne nur en Unes-
ko sed en la
mondo ĝenerale**

(Foto: Unesko –
Michel Claude)



de lingva hierarkio; la plej granda parto de la loĝantaro de la terglobo estas tiel senigita de lingva ilo, kiu al ĝi permesus plene profiti grandan parton de la modernaj esplorado kaj teknologio."

La Raporto plue asertas: "Plurlingveco estas alloga solvo kaj verŝajne la sola realisma solvo en la plimulto de la landoj, sed la disvastigo de unu simpla universala lingvo, komprenebla kaj alirebla al ĉiuj, povus plifortigi ankaŭ la naciajn unuecon kaj rapide malkonstrui la komunikajn barojn, kiuj dividas la popolojn." Kvankam tiu ĉi aserto parolas pli pri la stato en plurlingva lando, ĝi samtempe koncernas ankaŭ la multlingvan homaron. En la sama Raporto, en aldono ĉe la fino, ĉiuj el la komisionanoj povis fari siajn rimarkojn pri la konsentita tuto. En tiu parto Mustapha Masmoudi (Tunizio), en sia fina rimarko (sub 5, p. 347) diras:

"Fina observo koncernas la lingvajn problemojn, kiuj estas forte ligitaj al la socia komunikado kaj al la internacia komunikado. Kiel ni scias, la internacia kunlaboro estas bazita esence sur la reciproka interkompreno, kaj la diskonigo de la scienca penso pli ol antaŭe utiligas la novajn ilojn de komunikado. Sed la lingvaj baroj kreas konstantan obstaklon al tiuj faktoroj nepre necesaj por la paco kaj la progreso, kaj la mal-ekvilibro inter la lingvoj internacie uzataj en larĝa skalo konstante pligrandiĝas. Sekve, konvenas inviti la koncernajn internaciajn instituciojn okupiĝi pri la problemo de internaciaj lingvoj, por pristudi la konvenajn solvojn, kiuj povus forigi tiun situacion, kaj serĉi novan sciencan instrumenton por komunikado, kapablan stimuli kaj diskonigi, per plej ekonomiaj rimedoj, la plej grandan kvanton da informoj."

Je la nomo de UEA mi dum dek minutoj klopodis elmontri, ke la citaĵoj el la Raporto de MacBride estas gravaj, kvankam tre vagaj kaj nebulaj. Ili kvazaŭ evitas menciigi la jam ekzistantan kaj dum preskaŭ jarcento elprovan kaj harditan internacian lingvon Esperanto.

(vidu la daŭrigon sur p. 184)



Observanto kiu fariĝis partoprenanto: Mag. Tibor Sekelj sekvas la laboron de la 21a Ĝenerala Konferenco de Unesko.

Mi menciis ĝiajn ĉefajn atingaĵojn kaj fine emfazis, ke ĝi estas la solvo preta, atendantanta alprenon.

Mi respondis al la tri ĉefaj riproĉoj kutime farataj al Esperanto: 1) *Ke malantaŭ la lingvo ne staras iu granda kulturo, iu "propra animo", kiel malantaŭ la grandaj kulturlingvoj.* Jes, tiel estas. Sed tio ja estas ĝia granda avantaĝo, ĉar neŭtrala, nenion altrudanta. 2) *Ke ĝi estas artefarita.* Jes, same kiel ĉiu alia lingvo kiun oni lernas, krom la gepatra. Tamen, tiu "artefariteco" donas al Esperanto la regulecon kaj facilan akireblon, malgraŭ ĝia kompleteco. 3) *Ne sufiĉe disvastigita kaj mankas al ĝi fakaj libroj kompare kun la grandaj "mondlingvoj".* Tio estas vero, kiel konstato de la nuna situacio. Sed, ĉu ĝi devas haltigi nin? En la sama Komisiono ni aŭdis la aserton, ke en certaj regionoj de Afriko 80% de la loĝantaro estas analfabetoj. Sed, ĉar Unesko konsideras la alfabetigon grava, ĝi ekmovas ĉiujn eblajn rimedojn por ŝanĝi tiun situacion. La samo povus okazi pri Esperanto, se Unesko decidus, ke la simpla kaj efika kompreniĝo inter la homoj estas grava.

Post mia parolado tuj aliris min s-ro Masmoudi, kies rimarkon ni citis pli frue en ĉi tiu teksto, por gratuli kaj memori min pri sia opinio tre proksima al la mia. Sekvis aliaj interparoloj, kiuj nun estis pli favoraj, ol tiuj, kiujn mi havis antaŭ mia interveno. Tio kuraĝigis min kunmeti projekton de rezolucio, kiu rekomendus al la ĝenerala direktoro de Unesko: a) renovigi sian interesiĝon pri la atingoj de Esperanto, laŭ la Rezolucio de 1954; b) stimuli la publikigon de lernolibroj de Esperanto kaj eldonaĵoj de Unesko en Esperanto; c) inviti ekspertojn de UEA al plua diskuto pri la komunikado; kaj ĉ) rekomendi al la ŝtatoj-membroj la instruadon aŭ intensigon de la instruado de Esperanto en la lernejoj sur ĉiuj niveloj.

Ĉar ĉiun rezolucion devas proponi delegitaro de iu ŝtato-membro, mi komencis serĉi tian proponanton. Kaj mi trovis. La delegitaro de Honduraso — post entuziasma pledo de José Ignacio Mata, membro de la delegitaro, kaj ankaŭ de ĝia ĉefo Cecilio Zelaya Lozano — senhezite kaj kun varmaj vortoj akceptis prezenti la rezolucion sub sia nomo. Aliaj, iom pli heziteme, akceptis esti, ĉu kunproponantoj, ĉu subtenantoj, ĉu buŝaj apogantoj dum okazonta diskuto pri la propono. Inter tiuj estis la delegitaroj de Nederlando, Kongio, Aŭstrio, Papua Nov-Gvineo, Norda Koreo kaj Tanzanio; kaj pluraj aliaj devis ankoraŭ konsultiĝi.

Tamen, post nova pripenso de la afero, kun malvarma kapo, mi venis al la konkludo, ke eĉ se la rezolucio estus akceptita, ĝi restus sen granda reala efiko, ĉar nek Unesko nek la ŝtatoj-membroj estas konvene preparitaj por tia paŝo. Do mi decidis retiri la rezolucion kaj proponi al UEA uzi la proksimajn tri jarojn por vasta kaj intensa preparlaboro, por dum la venonta ĝenerala konferenco de Unesko elpaŝi kun grava propono. Intertempe la delegitaroj de ĉiuj landoj devos scii pri kio temas kaj koni la avantaĝojn de la solvo, kiun ni proponas.

Tibor Sekelj


INFORMADO:

Felietono kaj polemiko

ANTAŬ deko da jaroj, la Biblioteko Hodler de UEA kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) kolektis aŭ klopodis kolekti ĉiujn menciojn kaj artikolojn pri Esperanto, kiuj aperis en la nacilingva gazetaro. Iam ni klopodis en ĉi tiu revuo menciĝi ĉiujn turismajn perspektivojn en Esperanto, prinoti ĉiujn Zamenhof- aŭ Esperanto-stratojn en la mondo. Sed la tempoj ŝanĝiĝis. Ni ne volas diri, ke la Biblioteko, samkiel la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, ne plu kolektas la nacilingvajn artikolojn. Jes, ili faras tion. Tamen, la nombro de la artikoloj kaj mencioj tiel multe kreskis, ke apenaŭ plu eblas kaj apenaŭ plu necesas kolektadi ĉiujn etaĵojn, kies sola merito estas, ke ili mencias la Internacian Lingvon. Simile estas pri la turismaj perspektivoj kaj pri la stratoj kun Esperanta nomo.

Io grava, io esenca okazas kun la informado pri Esperanto. Ĝi ŝanĝiĝas kvante kaj kvalite dum la lastaj jaroj. Nun estas preskaŭ tute ordinara afero vidi artikolon pri Esperanto aŭ pri la lingva problemo en, ekzemple, *Le Monde*, *The Guardian*, *Asahi Šimbun* kaj aliaj mondrenomaj nacilingvaj gazetoj. Ni ne volas diri, ke ne plu restas io por fari sur la kampo de la informado. Ni simple konstatas la ŝanĝojn kaj ni demandas nin pri la kaŭzo de tiuj ŝanĝoj.

Estas tre verŝajne, ke nuntempe la ligo inter la informaj fakoj de la landaj asocioj kaj la informa aparato



Ingvar Schoultz dum la Kongreso en Stokholmo: Kapo plenplena je novaj ideoj pri la informa laboro (Foto: ZN)

de UEA estas malpli forta, ol ekzemple antaŭ dek jaroj. Kvankam la bultenoj de la Internacia Gazetara Servo de UEA ankoraŭ aperas de tempo al tempo, ili ne plu estas la ĉefa informfonto atendata de lokaj kaj landaj aktivuloj. Ĉu la manko de tiuj bultenoj iasence stimulis la entreprenemon de la landaj kaj lokaj aktivuloj sur la informa kampo? Ĉu ni nun simple komencas rikolti la rezultojn de ĉiuj antaŭaj informklopodoj? Ĉu la monda publika opinio komencas ĉiam pli klare konscii pri la lingva problemo? Estus ne nur interese sed ankaŭ grave por nia estonta laboro ekzameni tiujn demandojn kaj serĉi la ĝustajn respondojn. Ĉu eble tio estus taŭga esplorprojekto por CED?

Ni rigardu al la informaj rezultoj en kelkaj landoj. Unue Svedio, ĉar oni asertis, ke la Kongresa Gazetara Servo tie "tute ne funkciis" dum la 65a UK. Amaso da gazetaj artikoloj kaj intervjuoj en la svedaj ĵurnaloj, radio kaj televido tre efike dementas tiun aserton. La informado dum la 65a UK tre bone funkciis, sed ni ne rimarkis tion, ĉar ĝi estis direktita al la nacilingvaj informiloj, dum ĝi, aliflanke, neglektis tiun tradicion esperantlingvan informadon de ni mem pri ni mem. Pro iniciato de la stokholma junulo Ingvar Schoultz, pluraj el la plej grandaj novaĵagentejoj distribuis tutajn artikolojn pri Esperanto kaj la lingva problemo, anstataŭ unufrazajn telegramojn, ke la kongreso okazis en Stokholmo. Estas vero, ke ni devas organizi ankaŭ la movadan informadon pri la kongresoj, sed se ni devas elekti inter la stokholma gazetara servo kaj tiu antaŭa kun ĉiutagaj Esperantaj bultenoj, ni ne hezitu voĉdoni por la sveda modelo kaj la maniero en kiu Ulla Luin okupiĝis pri la informa laboro. Tiu sveda kongresa informado rezultigis almenaŭ duonmilon da informpetoj kaj tutan aron da Esperanto-kursoj tra la lando.

En Hungario la nacilingva informado ŝajnas esti je la plej alta nivelo. Tie jam de jaroj aperas ampleksa dumonata revuo *Mondo kaj lingvo*, aĉetebla en ĉiuj gazetvendejoj, abonebla ĉe ĉiu hungara poŝtoŝtelo. Vi scias, ke la hungara Esperanto-movado bone fartas. Tio certe estas grandparte rezulto ankaŭ de bona nacilingva informado.

Eble la kvalita ŝanĝo de la informado pri Esperanto plej bone estas sekvebla en Jugoslavio. Antaŭ deko da jaroj nur lertuloj de la tipo de Tibor Sekelj (vidu lian raporton pri la Unesko-konferenco aliloke en ĉi tiu numero) sukcesis fojfoje enŝovi ion pri Esperanto en la nacilingvan gazetaron. Tamen, dum la lastaj jaroj okazas tie tuta lavango da artikoloj kaj informoj pri Esperanto. Ĝus, inter la 17a kaj 22a de septembro, en la ĉefa ĵurnalo de Kroatio, *Vjesnik* (Heroldo), kiu havas ankaŭ eksterlandan eldonon en Frankfurto, Marinko Ĝivoje felietonis pri "Mirinda mondo de la lingvo". En tiu proksimume 7500-vorta teksto Ĝivoje ne parolas tre amplekse pri Esperanto mem, sed li instruas al la legantaro amason da utilaj aferoj pri la problemo de la internacia lingvo ĝenerale. La sama ĵurnalo aperigis komence de 1977 felietonon de Spomenka Ŝtimec pri "Internacia lingvo, kial kaj kiel?"

(4500 vortoj). Komence de ĉi tiu jaro ankaŭ *Politika*, la plej aĝa jugoslavia ĵurnalo, skribis pri la lingva demando kaj pri Esperanto. En septembro kaj oktobro ĉi-jare, oni eĉ polemikis pri Esperanto sur la paĝoj de la plej prestiĝa jugoslavia semajna revuo *NIN*. Tiu polemiko estas tute interesa kaj ni klopodos mallonge skizi pri kio temis:

Antaŭ kelkaj monatoj, sufiĉe konata eldonejo aperigis 300-paĝan libron *Živi jezik* ("La viva lingvo") de nekonata aŭtoro, Radoslav Gajić. La subtitolo de la libro estas "Eseoj pri komunikado kaj planitaj lingvoj". En la magazino *NIN* la 21an de septembro aperis proksimume 500-vorta teksto de Nikola Rašić, juna filologo kaj esperantisto el Zagreb, kiu asertas, ke la libro de Gajić estas plagiata transpreno ĉefe el la verkoj de Waringhien, Wells, Szerdahelyi k.a. Gajić poste respondis defendante sian libron. Rašić reatakis, kaj la tuto disflamiĝis en la formo de akra polemiko, kun multa



"Esperanto kaj kopiado" nomiĝis la unua teksto en la polemiko. La ilustristo de "NIN" jene komentis la tekston.


informa utilo por Esperanto. Fine, se tio estas la fino, prof. d-ro Dalibor Brozović, unu el la plej konataj jugoslaviaj lingvistoj kaj malnova esperantisto, klopodis kvietigi la polemikon per longa artikolo, kiu metas la aferojn en la ĝustan lokon. Prof. Brozović, kiu ceterre rekomendis la publikigon de la koncerna verko, atentigas, ke ne tiom gravas la aŭtoreco de la verko de Gajić, kiom la fakto, ke granda lingva teritorio ricevis popularsciencan verkon pri la temo, kiun la serbkroata kultura medio antaŭe ne traktis.

Se polemikoj ĝenerale malutilas, ni volas aserti, ke tiu ĉi certe estas tre utila por la informado pri Esperanto en Jugoslavio. Ankaŭ en tiu lando aperas almenaŭ du nacilingvaj periodaĵoj pri Esperanto, kiu ne malofte gastas ankaŭ en la televidaj kaj radiaj programoj. Ĉio ĉi estis rara, neekzistanta aŭ malebla antaŭ deko da jaroj.

Por emfazi la gravecon de la informa laboro ni kuraĝe aserti, ke malgraŭ ĉiuj aliaj atingoj de la 65a Universala Kongreso en Stokholmo, ĝia ĉefa merito tamen estas tiuj centoj da informpetoj, kiuj pro ĝi venis al la adreso de Sveda Esperanto-Federacio.

sm

Ili du ĉefrolis en la Pupteatra Internacia Festivalo: La ĉefroluloj de "Fabelo pri kateto, steleto kaj pri io alia" de la Ŝtata Pupteatro el Gabrovo (Bulgario)



PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO:

Pupoj kaj aplaŭdoj

La 13a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) okazis en Zagreb, Jugoslavio, inter la 9a kaj 12a de oktobro 1980. Ĉi-jare partoprenis 9 pupensembloj el: FR Germanio, Rumanio, Hispanio, Pollando, Bulgario kaj Jugoslavio. Samtempe okazis la 9a internacia renkontiĝo de la lernantoj de Esperanto. Venis infanoj el Hungario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Pollando kaj Jugoslavio. Ĉiuj bone ĝuis la diversspecajn altkvalitajn pup teatraĵojn. La plimulto de la prezentaĵoj estis farita esperantlingve kaj sukcesis gajni grandan aplaŭdon de la spektantoj.

Pro la egaleco en la valoro kaj escepta kvalito de la prezentaĵoj, same kiel pro la diverseco en la sceneja esprimo, la faka ĵurio decidiĝis ne doni la unuan ĉefpremion. Tamen la Ŝtata Pupteatro el Gabrovo, Bulgario, ricevis la unuan premion de la infana ĵurio por la ĉarma prezentaĵo *Rakonto pri kateto, steleto kaj ankoraŭ io*. La lingva ĵurio donis premiojn laŭ la kvalito de la parolata Esperanto sur kaj ekster la scenejo. La trian premion por la plej bona lingvouzo gajnis Rodica Alboiu de la pup teatro el Baia Mare, Rumanio, la duan Alexandru Bilinski ankaŭ el Baia Mare, la unuan Ryszard Szetela kaj Wiesław Sierpinski ambaŭ de la Ŝtata Pupteatro "Kacperek" el Rzeszow, Pollando. La premion "Jozefo Petrin" por la plej bona ekstersceneja lingvouzo gajnis Jolanta Nord el Rzeszow. La premion "Tibor Sekelj" por la prezentaĵo kun la plej homama mesaĝo ricevis la Ŝtata Pupteatro el Gabrovo. Ĝi ankaŭ gajnis la premion por la plej bona surbendigita prezentaĵo. La premion por la plej bona viva prezentaĵo ricevis la Ŝtata Pupteatro el Rzeszow.

Ĝeneralaj kvalitoj de la prezentaĵoj estis altnivelaj, kun diversaj esprimmetodoj kaj teknikoj: ombroteatro, marionetoj, homaj aktoroj, instrumenta muziko, kantoj kaj dancoj. Ĉiuj pupoj kaj aktoroj allogis la spektantojn, kaj per magio ili forprenis nin al la lando de fantazio. Krome, la kvalito de la lingvouzo de Esperanto estis ankaŭ sufiĉe alte taksinda. Regis bona interkomunikado kaj kompreniĝo inter la scenejo kaj la spektantoj.

Dum la 13a PIF Esperanto ludis grandan rolon kiel vera helplingvo. La Festivalo montris eblecojn kiel uzi Esperanton en la praktiko. La venonta PIF okazos, en du partoj, en Zagreb kaj ĝia ĝemelurbo Tromsø, Norvegio.

Mika Waseda

VIRINA AGADO:

Semajnfino EVA

KOMISIONO pri Virina Agado de UEA organizas semajnfinan seminarion por esperantistaj virinoj aktivaj (Semajnfino EVA). Dum la renkontiĝo okazos diskutoj pri la estonta virina agado de UEA, precipe rilate al la Monda Agadplano por la dua duono de la Jardeko por Virinoj.

La seminario okazos en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam dum la semajnfino de la 28a de februaro ĝis la 1-a de marto 1981. En la posta tago, tiuj kiuj deziras povos ekskursi al Hago, por turismi kaj viziti virinan instancon. Nur 15 personoj povos partopreni la seminarion, do interesitoj devas aliĝi antaŭ la fino de ĉi tiu jaro. Se aliĝos tro da homoj, la komisionanoj elektos tiujn, kiuj jam plej multe aktivas pri virina agado.

Informojn kaj aliĝilon petu de: Anna Brennan, p/a Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam, Nederlando.

BELARTAJ KONKURSOJ 1980

Originala prozo, Unua premio:

V.A. GLAZUNOV:

Ho mia kor'...

Memore pri mia forpasinta amiko, kiu rakontis al mi ĉi-suban historion

BAT-BAT, bat-bat, bat-bat. . . Ritme, obstine, instige — tra la konscio. "Ĉu koro?" — venas la unua penso. "Tio estas ke mi vivas?" Mi vivas! Tiu penso fortigas kaj rapidigas la batadon. Bat-bat, bat-bat, bat-bat. . . Ĝi vokas, promesas, kuraĝigas. Mi vivas! Tuj la penso serĉas rememoron kaj eligas ĝin el iuj cerebraj ĉeloj. Sed tre baldaŭ la klariĝinta konscio postulas ke mi okupiĝu pri la nuna, la anta situacio.

Mi eksentas malvarmon en mia korpo. "Bone, — mi pensas, — mi ne perdis la sensivecon". Mi provas palpi mian vizaĝon, sed tuj ĉe la ekmoviĝo akra doloro trapikas mian brakon. Tion mi perceptas kiel vundon. Samtempe obtuza doloro atakas mian kapon. Malfacile mi malfermas miajn okulojn kaj ekvidas stelojn en la ĉielo.

Ĉio silentas. Nur defore apenaŭ aŭdiĝas maloftaj kanonpafoj kaj apude incite kaj moleste grincas iu metalaĵo puŝata de la vento. Ĉirkaŭ mi siblante kuras neĝaj serpentoj, frostoj per glacia spiro bruligas mian vizaĝon. La korbatoj vokas al mi: "Ne prokrastu, agu tuj!" Mi rekolektas miajn fortojn kaj provas levi min de la glacia grundo, sed mi sukcesas nur turni min al alia flanko kaj froti miajn vangojn. Pro streĉo denove mi falas en abismon de senkonscieco.

Mi ne scias kiom da tempo pasas, sed kiam mi reakiras perceptokapablon, ĉio restas la sama. Tamen nun sinistra lumoj de distanca incendio, jen skarлата, jen oranĝkolora, vidigas al mi teruran kaj kaosan bildon de batalkampoj. Inter montoj da kriplitaj maŝinoj de morto tie kaj tie kuŝas malhele grizaj, iom priŝutitaj de neĝo, mistere senmovaj figuroj — miaj najbaroj. Miaj najbaroj! Ho, kia kutima, varmiga kaj homeca nocio venas al mi nun! Sed flamaj rebriloj makabre dancas sur la apuda kadavro. Pro tiuj movoj de la lumoj ĝi ŝaj-

nas esti viva, baraktanta, penanta levi sin de tiu frostiĝinta tero. Mi rigardas kaj ne kredas al miaj okuloj ĉar li tamen moviĝas! Baldaŭ mi konstatas, ke apud mi kuŝas vivanta homo. "Ĉu samarmeano aŭ malamiko?", — mi pensas serĉante mian pistolon. La respondo venas per si mem: la homo prononcas sufiĉe aŭdeble en germana lingvo: "Hilfe. . . Einen Schluck Wasser. . ." (Helpon. . . Gluton da akvo. . .). Tiam mi ankaŭ rimarkas muskoloran uniformon de germana soldato.

Li kuŝas surdorse. Apude, sur blanka pulvoro de neĝo, vidiĝas kontraste malhela, preskaŭ nigra makulo. "Sango, — mi pensas, — videble li ne plu estas danĝera".

Ankoraŭfoje raŭke dirinte la vorton "Wasser", li eksilentas kaj senmoviĝas. "Fino", — mi konjektas kaj intense ekpensas pri mi mem. Mense mi dankas miajn intendantajn kamaradojn por mia varma vestaĵo, por dikaj feltbotoj, en kiuj nun vigle moviĝas miaj piedfingroj. Tamen, kion mi faru? Se la militflegistoj ne trovos min, se mi ne povos iri mem, finfine mi ja frostiĝos ĉi tie spite mian bonan vestaĵon. Cefaleo premas mian kapon. Evidente mi estas kontuzita. La maniko de mia pelteto estas disŝirita, kaj la brako, malseka pro sango, lancinas ĉiam pli kaj pli ofte. Per penegaj artifaĵoj mi sukcesas elpoŝigi guman ringopansilon, elmanikigi la vunditan brakon kaj meti sur ĝin la ringon por ĉesigi la hemoragion. Provizora faciliĝo permesas al mi ĉirkaŭrigardi pli atente.

Nenio aldoniĝas al kaoso de la antaŭnelonge finiĝinta batalego. Nenia vivo ĉirkaŭe. Fora bruado de la milito pli kaj pli surdiĝas. Tiam subite mi rimarkas rean ekmoviĝon de la germano. Do li ankoraŭ vivas. Kio estas sub tiu griza, sange makulita uniformo? Tumultas en mi kontraŭdiraj sentoj: kolerego, ĉar li ja venis unua por mortigi min, la devo de militisto, scivolemo pri fremdulo, kompatemo pro la egala situacio, en kiu ni ambaŭ troviĝas, certa leĝo, kiu malpermesas mortigi malamikon se tiu ne rezistas, kaj ankoraŭ tre grava cirkonstanco — mi estas kuracisto, ordonita kuraci vunditajn malamikojn same kiel niajn proprajn armeanojn.

Subpremante mian doloron, mi ekmovis min al li, centimetre, sur mia postaĵo ĉar mi ne povas leviĝi pro malfortiĝo kaj vomiga kapturno. Fine mi kaptas lian malvarman manon kaj komencas palpi la pulson. Kaj dio mia! Se li pafus nun kontraŭ min, mi ne estus konsternita pli ol aŭdante el lia buŝo en germaneska prononco: "Ho mia kor', ne batu maltrankvile, el mia brusto nun ne saltu for. . .!"

Mi firme ekpremas lian pojnnon. Pro tiuj malmultaj Zamenhofaj vortoj mia propra koro estas preta salti el la brusto. Sen iel aprezi la eventon, unuamomente mi ekĝojas same kiel mi ĝojis ĉiam renkontante alilandan samideanon. Sed tuj poste falis sur min aro da problemoj: Kiel mi rilatu al li? Ĉu mi malkovru al li mian esperantistecon? Ĉu mi devas iamaniere apartigi lin de multaj samaj homoj el la malamika tendaro? "Samideano?" Tiu renversita murdisto, atencinta kontraŭ mia popolo, mia hejmo, mia patrujo estas mia samideano? Kiu pardonas al mi tian sakrilegion!

Tamen tre baldaŭ ĉiuj problemoj solviĝis por mi ĉar antaŭ ĉio mi eksentis en mi homon kaj trovis en mi konfidemon. "Unue mi devas helpi lin konforme al ĉiuj leĝoj, — mi sugestas al mi, — kaj poste mi vidos kio fakte li estas. Esperantisto li estas, do mi ankaŭ serĉu en li homon".

Tiel pensinte mi trankvile daŭrigas palpadon de pulso. Ĝi estas regula, bona. Tiam mi klinas min antaŭ lian vizaĝon kaj diras sufiĉe laŭte:

— Ne permesu do al via koro salti for. . . Spite ke vi ne venkis en decida hor'.

La korpo antaŭ mi faras tremon, de malantaŭ okulvitoj grandaj, rondigitaj okuloj rigardas min kun stranga, preskaŭ fizika forto. Ne estas eble esprimi tiun potencon radian fluon de miro, peto, espero kaj pento!

— Samideano? — li fine demandas raŭke kaj konvulsie kaptas mian manon.

— Nu, tion mi ne scias, soldato, ĉu mi estas aŭ ne **via** (mi emfazas la pronomon) samideano, — mi respondas. — Laŭ mia posteno nun mi devas helpi vin sendepende de niaj mondkonceptoj.

Mi surmetas al li lian defalintan ĉapeton el drapo kaj provas malbutonumi lian mantelon por almenaŭ difini la seriozecon de la vundo. La soldato ekĝemas kaj komencas delire balbuti germanajn vortojn. Mi komprenas, ke lia vesto neniel savus lin de la frosto kaj li certe mortus eĉ se lia vundo ne estus serioza. Tial mi komencas bateti kaj taŭzi lian korpon.

De tempo al tempo mi ĉirkaŭrigardas kaj vokas por helpo. Senrezulte. Analizinte la ĉirkaŭan situacion, mi konkludas, ke germanoj retiriĝis. Do mi povas esperi pri relativa sekureco kaj riskas pafi el mia pistolo.

Ankaŭ nenia efiko. Tiam mi kuŝiĝas apud la germano kaj kovras lin per duono de mia ŝafpelto. Estiĝas kortuŝa kuno! Du malamikoj, ĵus pafintaj unu kontraŭ la alian, plej paceme kuŝas sub unu peltkovrilo, dum unu el ili zorgeme flegas la alian. Pli absurdan situacion oni ne povus imagi!

Mia protektato silentas, spirante malfacile, kun fajfaj sonoj kaj ĝemoj. Iam li denove petas: "Wasser". Mi metas iomete da neĝo sur lian buŝon. Li avida forlekas ĝin.

— Vi ne devas trinki multe da akvo, — mi edifas. — Pacience atendu helpon de niaj militflegistoj.

— Ĉu vi estas. . . rusa soldato? — li demandas.

Mi respondas, ke mi estas soveta hospitalestro kaj sugestas, ke li nun ankaŭ ne devas multe paroli ĉar mi nenion scias pri lia vundo kaj ne povas lin flegi ĉar mi mem estas vundita.

— La tasko por ni ambaŭ nun estas protekti nin kontraŭ frosto, — mi aldonas.

"Diablo scias, — mi pensas en ĝena maltrankvilo. Ĉu li ne povas esti bona homo? Estus ja domaĝe se li perdus siajn piedojn pro frosto. Jen la zorgo, kiu ankoraŭ mankis al mi!"

Mi sentas, ke li turnas al mi sian vizaĝon kaj varme flustras en mian orelon:

— Mi dankas vin, doktoro.

— Por kio vi dankas min?

Nur ĝemo estas lia respondo. Li ekmoviĝas, vane penante sin levi. Mi supozas, ke lia dorso froste fiksiĝis al la grundo kaj li ne povas deŝiri sin. "Eble tio helpus lin, — mi pensas, — ĉar malvarmo evidente ŝtopis lian vundon, kaj sango ne fluas plu."

Nokto. Neniu venas. De tempo al tempo mi profundiga en neniecon, kaj kiam mi reaperas el tiu oceano de malesto, mi pensas pri aferoj tute malproksimaj de mia nuna stato, de la terura milito, de la danĝero, kiu ĉiam deĵoras apud ni, la plugistoj de Mortokampo. Mi rigardas al senfine malproksima stelo, mi sendas al ĝi mian penson, kaj de tie — al mia hejmo.

Neniu venas. Abomena malpovo ŝajne paralizas min, sed mi sentas agrablan dormemon. La koron skrapanta grincado de la feraĵo, tiu senfina inci-zi, inci-zi, inci-zi, iom surdiĝis, kaj ĝi eksonas al mi kvazaŭ mia patrino milde tuŝus klavojn de l' piano en nia karese varma, vespera hejmo. Tamen mi ankoraŭ povas percepti, el kia neimagebla kaj korprema foro venas tiuj svagaj sonoj, kaj mi bone scias kion ĝi signifas: ni ambaŭ en "frata" brakumo estas frostiĝantaj.

Probable tiu lasta penso subite vekas en mi proteston. Mi vigle ekzercas miajn moveblajn membrojn, batas mian fremdan kunulon kaj demandas lin:

— Hola! Ĉu vi vivas?

Li respondas per iuj susuraj sonoj. Mi divenas, ke liaj lipoj kaj lango ne povas prononci vortojn. Mi masaĝas lian ostecan vizaĝon, la buŝon kaj diras:

— Rezistu, rezistu ankoraŭ iom da tempo. Diru almenaŭ vian nomon.

Mi apenaŭ aŭdas lin diri:

— Mia nomo estas Altergott.

— Maljuna dio, ĉu ne? — mi penas ŝerci, tradukante tian kuriozan nomon.

— Jes, jes. Maljuna dio, — li flustras. — Julius Altergott.

— Kontrolu viajn piedojn kaj manojn, Julius Altergott, — mi sugestas. — Ĉu vi sentas malvarmon en ili?

Li silentas. Nur vaporaj nubetoj de lia spirado vidiĝas ĉe lia buŝo. Tamen mi preskaŭ danke rimarkas, ke li movas siajn piedojn vestitajn per monstraj kvazaŭbotoj el pajlo.

Fine li diras, denove turnante al mi sian vizaĝon:

— Ĉu vi povas. . . Ĉu vi povas kredi al mi?

— Stranga demando, — mi respondas. — Pri kio mi kredus?

— Ke mi. . . ne estas via malamiko, — li eldiras apenaŭ aŭdeble.

Streĉante mian forton, pene mi rediras:

— Certe mi povus kredi. "-Us", "-us", ĉu vi komprenas? Se mi havus iun certigan motivon por tio. Ĉu vi povus kredi al **mi** en tia situacio, se vi estus mi, kaj mi estus vi?

Verŝajne tiumomente mi vomis kaj ne plu ion memoris.

Mi rekonsciiĝas pro viŝa manipulado ĉirkaŭ mia buŝo, sur miaj vangoj kaj kolo. Malfermante la okulojn, mi

surprize vidas la vizaĝon de Julius pendi super la mia, dum liaj manoj faras al mi tualeton aŭ rekonsciigan operacion. Kaj preskaŭ samtempe mi aŭdas proksiman ruslingvan parolon. Aliras soldatoj.

— Vidu, vidu! — ekscite diras la unua voĉo. — Estas ja nia hospitalestro!

— Tiu diablo mortigis lin! — reeĥis la alia.

Pro stuporo mi ne povas diri eĉ vorteton.

— Ha! — krias la unua soldato. — Tuj mi lin. . . — kaj li ŝire deprenas aŭtomatpafilon de sia brusto.

La dua kaptas lian manon, kaj mi samtempe ekkrias fine:

— Ne! — kaj pli trankvile: — Mi ordonas flegi lin kaj ekspedi al hospitalo.

La dua soldato komandas ion pri la flegistoj. Baldaŭ kamiono venas kaj oni levas nin en la karoserion. Ni ekveturas. Iomete heliĝas la ĉielo, kaj steloj estingiĝas unu post la alia. Tion mi memoras laste.



Mi vidas nekonatajn homojn ĉirkaŭ mi. Iom post iom mi ekscias, ke mia hospitalo. . . Tie oni trovis nur miksaĵon el pecoj de homaj korpoj kaj kaoson el tuta kuracilaro. Tial mi estas en alia hospitalo jam malproksime de la fronto.

Mi demandas flegistinon, ĉu estas en la hospitalo vundita germana soldato. Ŝi respondas, ke estas kelke da

tiuj. Mi petas, ke ŝi sciigu pri la soldato nomata Julius Altergott. Ŝi rigardas min iom mire: "Ja kiajn kapricojn iam havas la kompatinduloj!" Tamen ŝi enskribas en sian notlibron strangan nomon de la germana soldato kaj tre rapide revenas kun informo:

— Tiu Alter. . . Altergott ekzistas ĉi tie. Kaj li ja demandas ĉiujn pri iu hospitalestro, kun kiu li estis trovita sur la batalkampo. Probable vi, kamarado majoro? . . Kion vi volas scii pri li?

— Por komenco mi volus scii lian staton, — mi respondas.

— Li bone resaniĝas. Post du semajnoj, mi opinias. . . Mi petas la flegistinon, ke antaŭ ol li forlasos la hospitalon, ŝi venigu lin al mi. Ŝi promesas peti permeson de la estro.

Grizhara, altstatura kaj fortika viro en blanka mantelo, pendanta nur surŝultre super lia uniformo, aliras al mia lito, serene kaj karese ridetante:

— Nu, kara kolego, nun vi aspektas brave! Nun mi povas diri, ke fine vi eskapis el manegoj de la morto.

— Kaj serioze li aldonas: — Bedaŭrinde mi tamen devas ekspedi vin al speciala hospitalo en Moskvo, karulo mia, ĉar vi komprenas ja, ke ĉi tie ni ne povas antaŭvidi ĉiujn surprizojn de la kontuzo.

Je mia acida mieno li denove ekparolas ŝerceme:

— Ha! Vi ja estas vera bravulo. Vi ne nur savis vin mem, sed vi eĉ liveris al ni militkaptiton! Li dankas vin por tiu kaptiteco. Li ĉiam demandas pri vi. Tre interesa ulo, mi diras al vi. Oni trovis en lia poŝteko specialan karton kun punordonoj pro pacifismaj ideoj kaj la portreton de Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, se mi ne eraras. Kaj li ankaŭ demandas, kiam oni pafmortigos lin. Verŝajne naziaj samlandanoj sugestis al li la ideon.

Mi certe tuj petas la estron pri permeso venigi al mi tiun "interesan ulon".

— Nepre, nepre, amiko mia. Distru vin iomete. Nur iomete! — li levas la montran fingron. — Ĉar vi ne devas lacigi vin. Ĉu vi parolas germane?

— Mi parolas Esperante.

— Ĉu?! — kluhas la hospitalestro. — Ĉu oni povas eĉ paroli en tiu lingvo?

— Eĉ kanti, se vi volas.

— Huu-u. . . — li prononcas balancante la kapon kaj, evidente mirigita, foriras.

Sekvantan tagon en nia ĉambro aperas stranga homo en tro granda hospitala mantelo, pendanta ĝis la piedpintoj, kun blondaj hirte starantaj haroj, kun rondaj okuloj, serĉe kaj konfuze rigardantaj tra dikaj okulvitroj de sur la buntkolora makulita vizaĝo. La tuta figuro tiukaŭze, tute malkonvene al la loko kaj cirkonstancoj, aspektas tiom burleska, ke miaj samĉambranoj post konsterna silentiĝo eksplodas per rido. Mi malpacience petas ĉesigi la ridegon kaj demandas la veninton: — Ĉu vi estas Julius Altergott?

— Ho! — li ekkrias, tuj alirante al mia lito. — Estas mi, nature, sinjoro doktoro. Kiel vi fartas nun?

La flegistino, franjo Lena, donas al li seĝon. Ne rimarkante la serveton kaj neniel atendente ĝin, li sin klinas antaŭ mi kaj diras emocie dankajn vortojn. Post kiam fine li eksidas kaj la temo de renkontiĝaj rutinaĵoj elĉerpiĝas, li elpoŝigas malgrandan paperujon, akurate, kvazaŭ celebrante, prenas el ĝi sekigitan floron de edelvejso kaj ĝin etendas al mi:

— Jen, por memoro pri nia mirinda renkontiĝo. Mi tre ŝatas tiun floron, kaj ĝi estis kvazaŭ mia relikvo, iu lumero dum la nigra tempo. Mi trovis ĝin en Alpoj en serena tago de mia juneco kaj ĝi simbolis al mi pacon kaj feliĉon.

Mi dankas kaj provas rifuzi la donacon tre karan al li, sed li tiel insistas, ke mi cedas.

— Diru al mi, sinjoro doktoro, — li komencas flustri, — ĉu vere sovetiaj militistoj ne mortigas la militkaptitojn?

— Sed kiu diris al vi, ke oni mortigas?

— Kelkaj tiaj estas en nia ĉambro, sinjoro doktoro.

— Tre bedaŭrinde, ke tiaj estas, — mi sugestas kaj klarigas la veron.

Julius estas trankvila. Kelkan tempon li silentas. Li pensas.

— Mi ne estas via malamiko, — li denove diras al mi. — Ĉu vi ne volas kredi min?

— Mi kredas al vi, Julius, — mi respondas.

Li kaptas mian manon, ne vidante, ke en ĝi mi tenas lian edelvejson, kaj premas ĝin. Mi rimarkas, ke li ploras.

— Kial vi ploras, Julius? — mi demandas.

Li forturnas sian vizaĝon kaj, konfuzita, respondas:

— Mi ne scias. . . Venas al mi iu kortuŝa sento, simila al tiu, kiun mi havis tiam, dum mia ekskurso en Alpmontaro. Homoj estas strangaj estaĵoj, mi opinias, ili ploras pro malfeliĉo kaj pro feliĉo. — Li ridetas kaj daŭrigas, — Efektive, kiam mi ekvidis montosuprojn, kovritajn de freŝa, blankega neĝo, kaj la malhele bluan ĉielon super ili, mi ploris, sinjoro doktoro. Ĉu ne estas strange?

Mi diras, ke tia emocio tute ne estas stranga, sed nature homa.

— Mi ne multe studis sciencojn, — li respondas, — mi estas simpla laboristo, pro tio mi ne ĉiam scias klarigi al mi diversajn aferojn en nia vivo.

Tiel facile kaj agrable fluas nia amika konversacio de unu temo al alia ĝis la hospitalestro aperas en la ĉambro. Li ŝerce minacas al mi. Mi ne volas trouzi lian afablecon, rapide trarigardas miajn paperojn, trovas inter ili mian antaŭmilitan foton kaj donas ĝin al mia gasto. Por memoro. Ne nur: ankaŭ por simboli nian amikiĝon. Tre kontenta li foriras.

Kion li portas en sia animo? Mirinda afero: la respondo al tio mi tralegas sur la vizaĝoj de miaj kamaradoj — ili ridetas al mi bone! Per kelkaj vortoj mi klarigas al ili la esencon de nia konversacio. Ili respondas per aprobaj eksklamacioj.

”Ho, homoj, kiuj vi estas?” — mi pensas, fermante miajn okulojn.

Julius Altergott venas por min adiaŭi. Li staras rekte, kun freŝe razita, sanaspekta vizaĝo. En liaj okuloj mi vidas esperon, dankon, naivan karesemon de bonkora homo. Miaj kamaradoj grupiĝas apude kaj bonvoleme rigardas tiun iom strangan spektaklon. Ni interkonsentas pri la estontaj kontaktoj, kaj tiumomente alarma krio eksonas tra la tuta hospitalo: ”Aero!” — la averta signalo pri aviadilatako. Tondraj eksplodoj miksiĝas kun klakegoj de kontraŭaviadilaj kanonoj. Ĝemas kaj tremas la muroj, disflugas vitreroj de la fenestroj kaj en la ĉambrojn ekblovegas malvarma vintra aero kun specifaodoro de eksplodaĵo.

Kelkaj miaj kamaradoj estis mortigitaj, ankaŭ la hospitalestro. Nin, la ”feliĉulojn”, oni translokgis en aliajn domojn. Je miaj demandoj pri la sorto de Julius Altergott oni diris, ke la grupo de germanoj, en kiu li troviĝis, pereis sub bomboj de siaj samlandanoj, veturante en kamiono al tendaro por militkaptitoj. Post kelkaj tagoj mi estis ekspedita al Moskvo kaj neniam plu aŭdis ion pri mia malfeliĉa amiko.

Multajn jarojn post la eventoj rakontitaj, iun belan tagon mi promenis en parko. Estis tre taŭga tempo por tio dum paŭzo en fakaj kunsidoj de Universala Kongreso de Esperanto. Ekvidinte grupeton da samideanoj, mi aliĝis al ili. Post kutimaj reciprokaj salutoj, ŝercoj kaj nepra divenado de ”El kiu lando vi venis?”, tiu ”kongresero” daŭrigis la evidente antaŭe komencitan konversacion. Temis pri la dua mondmilito. Mi streĉis mian atenton.

Magra kalvulo, kun maldensaj faskoj de restintaj blankaj haroj, rigardante tra specialaj prismaj okulvitroj, rakontis pri sia restado en sovetia tendaro por militkaptitoj. Li parolis ekzalte, kun admira entuziasmo, kvazaŭ temis ne pri banala sorto de militkaptito, sed pri iu surprize agrabla feriado.

— Kie vi estis kaptita, samideano? — mi demandis, tuj volvita en etoson de la fora kaj tranĉe ekscita rememoro, kun espero ekscii ion pri mia amiko.

— Mi kaptiĝis ĉe la sojlo de Moskvo tute kurioze.

Vundita, mi estis ne kaptita, sed savita de. . . , — li fosis en sia jakpoŝo, — de tiu ĉi rusa esperantisto, kies nomon mi eĉ ne scias! — kaj li etendis al ni foton kun mia vizaĝo preskaŭ kvardek jarojn pli juna!

— Julius! — mi ekkriis, ĉu vi estas?!

— Doktoro! — li reeĥis. — Ho mia kor’, ne batu maltrankvile! . . .

V.A. Glazunov,
Soveta Unio

GLOSOJ

cefaleo: persistema kaj potenca kapdoloro.

hemoragio: pli-malpli abunda sangelfluo pro vundo aŭ rompiĝo de sanga vaskulo.

incizi: metode dividi molajn partojn per tranĉa instrumento; entranĉi.

lancini: dolori per sinsekvaj subitaj atakoj, akutaj kaj nedaŭraj.

pansi: meti sur vundon iajn substancojn, por purigi, kuraci kaj ŝirmi ĝin kontraŭ eksteraj infektaĵoj.

stuporo: ĝenerala aŭ loka rigidiĝo; obtuza senmoviĝo pro fortega surprizo aŭ timo.

Facila enkonduko al la ĉina poezio

Recenzas Leopold Knoedt (Brazilo):

El ĉina poezio. Red. kaj el la ĉina tr. Saint Jules Zee. Beijing: El Popola Ĉinio, 1980. 14+135p. 21cm. 10-Es-1526.

Per bone klariga antaŭparolo la tradukinto enkondukas nin en la ĉinan klasikan poezion almenaŭ tiom, kiom necesas por konatiĝi kun ĝia verstekniko. Bedaŭrinde nek en Esperanto nek en aliaj okcidentaj lingvoj eblas imiti la tonojn de la ĉina, kiuj ĝin provizas per tiu speciala ĉarmo, ke la parolata lingvo aŭdiĝas kvazaŭ kantata. Perdiĝas krome en la tradukado alia agrabla impresio, ĉi-foje sur nia vidosenso: tiu de la ideogramoj artisme pentritaj sur kakemono.

Ne ĉio tamen perdiĝis en la tradukoj. Parton de la cititaj mankoj kompensas la facila legebleco de la simplaj versaĵoj, liberaj je la hermetika komplikeco tiel ofte renkontata ĉe okcidentaj poetoj.

La tradukitaj pecoj plene pravigas la aserton de S.J. Zee, ke "diference de la okcidenta poezio, la universalaj temoj: Dio, amo kaj milito ne okupis tiom gravan

virino, kiun forlasis amanto, preskaŭ ĉiam por iri militen.

Sed unu aferon ĉinaj poetoj nepre havas komuna kun ĉiuj aliaj: ili restas pli sur la malgaja flanko de la vivo ol sur la gaja. Tiaj estas ekzemple la kortuŝaj "La orfo" (p. 10) kaj "Poemo" (p. 16). Ankaŭ tre universalaj ili fariĝas, kiam ili prikantas la eternan temon de forvelko de juneco, dum Li Bai atingas mondvastan kulminon en la du lastaj versoj de "La leviĝo kaj subiro de la suno":

*Mi volus jam la tutan kosmon ĉirkaŭbraki
Kaj unuigi kun la vivofont' en la eterna lulo!*

Kurioze la tradukinto foje inversigas la ordon negacio-refleksivo, peko pri kiu ordinare kulpas ni, latinid-lingvanoj. Ankaŭ la uzo de **homo** por **viro** (p.4), komuna al multaj lingvoj, evitendas en Esperanto. Zamenhof tre saĝe kaj anticipante la feminisman movadon, kreis la **viron** distinge de la **homo**, por ke ne estu tiu la reprezentanto de la genro.

La dua parto de la libro – "Modernaj poemoj" – estas forte realismaj poeziaĵoj kaj same facile legeblaj, malgraŭ kelkaj simbolismaj enportaĵoj, kiel ekzemple "Staranta akvo", kiu el Malbela scias *krei mirindan mondon*, kaj la lasta verskvaro, en kiu la maljuna avo legas la horon de la tago el la okuloj de la kato, anstataŭ rigardi rekte tra la fenestro. . .

Kun la delikateco de la poemoj plene kongruas kelkaj fajnaj vinjetoj kaj la bonkvalita preso. Tamen malmultaj prezeraroj enŝteliĝis: p. 59, l.10: **migrandantan**, p.7, l.1: **rekompenco**, kaj manko de akuzativo en la lasta linio de p. 113.

Mendu ĉe UEA: broŝ. 10,80; bind. 13,50 (por Nederlando 11,23 aŭ 14,04) gld., plus sendokostoj 10%.

Spertiĝu per „Kiel diri...?”

Recenzas Koiĉi Ŝimizu (Japanio):

Kiel diri. . . ?; Praktika Esperanta frazeologio, de L. Lentaigne. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1980. 170p. (nenumertaj). Mimeo. 21cm.

Ĉi tiu libro estas laŭtema kompilaĵo ne nur de vortoj sed ankaŭ de esprimoj, kliŝaj, figuraj, proverbaj, kiuj ĉiuj estas ĉerpitaj el *PIV* k.a. Tiuj ĉirkaŭ kvin mil esprimoj estas klasifikitaj je 67 temoj (rilataj precipe al ĉiutaga vivo), kies artikolaj kapvortoj estas laŭ la alfabeto ordo. Vidu komencajn pecetojn ekzemple sub "Ludi": " 'Kiu ne riskas, tiu ne gajnas.' Pri infanoj: 'Lotu, por ke ni sciu, kiu ludos la unua.' . . . 'La loto falis sur lin, trafis lin'. . . . Ludi 'rabistoj kaj ĝendarmo', 'kaŝiĝo' (kukui), je averso kaj reverso, fronto aŭ dorso



lokon en ĉina klasika poezio". La du lastaj temoj ja abundas en la specimenoj, tamen ilia pritraktado estas nek patosa nek epika. Ĉinaj poetoj ŝajne malŝatis prikanti la falsajn bravulojn, kiuj per glavo kaj fajro falis sur fremdajn popolojn rabocele. Kiel diras Zee: "Ili gloris nur la heroojn de la kontraŭinvadaj militoj". Krome – se tiaj ekzistis – ili ignoris Otelojn kaj Don-juanojn. La amo, kiun ili priversas, estas ĝenerale iu pli trankvila sento, kaj plejofte la temo estas saŭdado de

de monero. 'Vi estas varma' (proksime al serĉata objekto de la ludo). . . Morao. Tuŝludo. Ŝafsaltado. Rulringo. Ŝnursalti. . ."

Ĉi-speca lernolibro celas la parkerigon per la metodo de rilatigo-asociigo de samtemaj aferoj kaj ties esprimeroj. La recenzata verko sukcesas en tio. El ĝi oni profitos ne malmulte kvazaŭ ludante la ludon de imago. La recenzanto rigardas ĝin taŭga ilo por riĉiga praktika kurso, por ke lernantoj povu regi Esperanton rilate ĉiutagajn detalaĵojn. Eĉ se ni povas fari ŝablonajn kongres-salutojn, se ni ne povus libere esprimi hejmajn ĉiutagaĵojn, — ni ne povus konvinki la ceteran mondon pri la vera vivanteco de Esperanto. Ni memoru la sekvantan diron de Zamenhof: "Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian." (O.V., p. 323.)

Por plene ekspluati la libron estas necese havi ankaŭ *PIV*, ĉar en ĉi tiu verko aperas ne malmulte da vortoj (precipe fakaj), kiuj troviĝas en *PIV*, sed ne en Esperanta-nacilingvaj vortaroj. Kaj estus pli bone, se la kompilinto de *Kiel diri*. . . ? enkondukus pli da aferoj ekster Eŭropo, kaj ankaŭ se estus pli malmulte da preseraroj (enestas ĉirkaŭ kvindek aliaj mispresoj krom tiuj montritaj en la erartabelo).

Mendu ĉe UEA: 9,00 (por Nederlando 9,36) gld., plus sendokostoj 10%.

Maldrameco de dramo

Recenzas Peter Rados (Hungario):

La amo de Danto Alighieri, de Trygve Müller. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1978. 115p. 20cm. Plejado 8.

Ekzistas nacioj, kies historion kaj kulturon la mondo bone konas. Inter tiuj troviĝas la italoj. Se iom klera eŭropano aŭdas la nomojn Giotto, Leonardo, Dante, Boccaccio kaj aliajn, kiom multe li jam scias pri ili! Do, temon pri Dante ne hazarde elektis Trygve Müller. Temas cetere ne nur pri amo. La dramo **rakontas** la historion, kiel Dante Alighieri, la estinta prioro de sia urbo-respubliko, Florenco, kaj ĝia plej granda filo, estis ekzilita. Aliflanke estas **rakontite**, kiel Dante amis du "virgolinojn" (fraŭlinojn) ĉirkaŭ la jaro 1300. Unu (Gemma dei Donati) li amis "kore", la alian (Beatrice Portinari) "anime".

Mi intence uzis dufoje la verbon "rakonti", ĉar tio signifas: *La amo de Danto Alighieri* fakte ne estas dramo, sed prefere romantika **rakonto** en drameska formo. Nur anstataŭ la aŭtoro ĝin rakontas la rolantoj. La kortuŝan, kvankam parte iom banalan historion — Florenco en la 14a jc. kaj platoneska amo de Dante — multaj konas el siaj iamaj lernolibroj. La alia parto de la historio — kiel rilatis Dante al Beatrice kaj al Gemma, kiel tiuj du rilatis inter si — estas elpensado de la aŭtoro. Tio baziĝas je la penso, ke "ne nur la saluto de Beatrice kiel 18-jara junulino estis la kaŭzo de tiu verko, sed ke arda amikeco kaj multoblaj renkontiĝoj

inter ili rezultigis la verkon..." — *Dia komedio*. Tion kredi kaj ŝanĝi la ĝenerale konatajn faktojn estas rajto de beletristo. Tamen, oni ja scias, ekzemple, ke kiam Dante forlasis Florencon, li tute ne estis fianĉo, kiel en la dramo, sed edzo kun infanoj, kaj, ke ankaŭ Beatrice edziniĝis ktp. La grava manko ne tio estas, sed la **maldrameco** de ĉi tiu libro. En dramo (komedio, tragedio) ja konfrontiĝas homaj intencoj, volo, sentoj kaj ĉiu laŭ la propra vidpunkto pravas; la heroo luktas kaj, ĉu tragike, ĉu komike, falas. En la verko de T. Müller ĉio ĉi mankas. Aperas la historiaj figuroj, kiel sur impona, kaj tamen teda akademiisma pentraĵo.

Mendu ĉe UEA: 14,10 (por Nederlando 14,66) gld., plus sendokostoj 10%.

Biografio de Kolbe

Recenzas W. Krikke (Nederlando):

La dia avarulo, de Jan Dobraczyński. El la pola trad. B. Monkiewicz. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1979. 85p. Fotoj. 20cm. Plejado 11.

Jen biografio de la pastro Kolbe, kiu famiĝis pro heroa kaj homama konduto en la koncentrejo Oświęcim (Auschwitz). La rakontoj pri ĉi tiu eksterordinara vivo povus esti tre interesaj, se ili ne estus tiel ekstaze prikribitaj. Ankaŭ li estis ftizulo, havis nur unu pulmon, stomakdolorojn kaj frostvunditajn fingrojn dum jaroj, kaj tamen li kuris kaj biciklis pli rapide ol ĉiuj aliaj. Li laboris multege kaj manĝis plej simple. Kiel estas eble? La tuta vivo de Kolbe estis unualoke dediĉita al "la Senmakula" t.e. al Maria, sed samtempe ankaŭ al ĉiuj liaj kunhomoj.

La lingvouzado de la tradukinto havas multajn mankojn. Ofta estas la konata, tamen tial des pli evitenda slavismo pri vortordo: "kun karakteriza al li energio", "kelkaj similaj al li fervoruloj", "al la libera jam patrolando", "li vizitas la similan al N. klostron". Tiaj nelogikaj konstruoj svarmas, bedaŭrinde. Pluraj neologismoj, pluraj aliaj neprecizaĵoj, malgraŭ du reviziintoj (kiel ili do funkciis?). Papero kaj preso tre bonaj.

Mendu ĉe UEA: 13,80 (por Nederlando 14,35) gld., plus sendokostoj 10%.

Sen la lastaj 50 jaroj

Recenzas Probal Daŝgupto (Hinda Unio):

Enkonduko al literatura kritiko, Giorgio Silfer (1949-). Kuopio/Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj/ Librofako de Literatura Foiro, 1978. 44p. 30cm. SUK-Kursoteksto KT 30.

Eble komenciĝos multflanka diskuto pri la Esperanta literaturo, kun la celo interkontaktigi sufiĉe diversajn konceptojn pri la naturo de literaturo kaj manierojn ŝati ĝin. Se jes, ĉi tiuj lekcioj de atentenda literaturulo kontribuas, kvankam iom ekscentre. Laŭ p. 8, literatura kritiko disvolviĝas i.a. "tra *elzeviro*, aŭ eseeto en

alta stilo", kvankam, lamentinde, en la Esperanta kritiko "nekonataj estas rimedoj kiel elzeviroj ktp." Tiaj specifegaj, eble ne monde utilaj instruoj iom abundas, kion mi trovas ekscentra. Sed apudestas, pli memor-kapte, konstatoj vaste interesaj. Jen: 1) "La ĉefa areo de Esperanto, kiel literatura lingvo, estas Eŭropo, kaj la penetra de Esperanto en aliaj mondopartoj estas iel ligita al la penetra de eŭropa civilizo" (p. 16). 2) Sed feliĉe la esperantistoj havas "trajtojn de internacia diasporo kaj minoritata lingvoetno" (p. 41). 3) Kaj, kvankam unuflanke oni, t.e. Silfer, "kontestas la literaturan valoron de la 'indiĝenaj verkistoj' [en Esperanto], aliflanke oni emfazas la unikecon de la komunumo uzanta Esperanton kaj serĉas inter la muroj de tiu *verda getto* la homojn kiuj sukcesis diri ion valoran ankaŭ por la *gojoj* [eksteruloj], tiel iĝante vere internaciaj aŭtoroj... Ne estu ni, sur nia *vulkana verda insuletaro*, vilaĝanoj atendantaj la interesiĝon fare de la kontinento; sed ni mem iru al la kontinento, lernu tie kaj revenu al niaj feliĉaj kaj malkleraj havenoj" (p. 41). 4) Por ekzempli iron "al la kontinento" Silfer volas "aserti, ke en internacia metriko por internacia lingvo (kun tiaj karakterizoj, kiajn havas Esperanto) post la esploroj de la parnasanoj estas necesaj ankaŭ esploroj en la metrikoj de kelkaj aziaj lingvoj, aglutinaj kaj izolaj, kie ritmon kreas aliaj elementoj ol nur la alterno de akcentaj kaj senakcentaj silaboj" (p. 20).

Mi tiel entuziasme konsentas tion lastan, ke mi ŝatus aldiri, ke Azio povas instrui ankaŭ kriteriojn, ne nur metrikon. La hinda literatura penso, ekzemple, ampleksas tri ĉefajn alirojn al la literaturo: a) tra formaj demandoj de metriko k.s., b) sur la stila nivelo, sed plej grave c) per studo de la sistemo, laŭ kiu teksto kunĵetas rolulajn emociojn, agojn kaj situaciojn, detale tiun kaj bridante alian, kun la celo estigi purajn aŭ miksajn emociojn, atentotenon kaj klimaksosentojn ĉe leganto. El tiu vidpunkto la eŭropa kritika tradicio estas malriĉa, neevoluinta, ĉar ĝi maltro atentis tiun c), kiu donas sencon al la literaturo entute.

Silfer, kiu uzas esprimojn kiel "la antikveco" (p. 5) eĉ ne rimarkante, ke li pensas nur pri la antikva Eŭropo, provas prezenti la eŭropan kiel la tradicion. Sed eĉ ne ĝin li multflanke prezentas. Ĝenas la nealudo al la

lastaj kvindek jaroj, dum kiuj kreskis riĉe tekstoanalizoj bazitaj sur la "prag-skola" prilingva penso (Mukařovský, Jakobson) kaj sur aliaj lingvopensaj tradicioj en Francio, Italio kaj Soveta Unio. Tamen, tiajn mankojn certe forigos pludiskuto, ĉu ne? Gravus, ke multaj homoj kuraĝe surpaŝu la "kontinenton" de literatura kritiko. Kaj lego de ĉi tiu libro helpas.

Mendu ĉe UEA: 18,60 (por Nederlando 19,34) gld., plus sendokostoj 10%.

Bona disko por senzorga festo

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Karnavalo en Rio, kvar kanzonoj de Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Sono-Viso, s.j. (1980). 18cm. 33t/m. Stereofona. SC 003-SV 078.

Karnavalo en Rio. Jes, Rio de Janeiro, tiu antaŭa ĉefurbo de nia venontjara kongreslando. Karnavalo fama en la mondo. Se jam nur pro televidaj raportaĵoj pri ĝi. Iuj en la mondo, kiuj ne edukiĝis en regiono kie ĉiujare oni kvazaŭas ke la vivo estas nur ĝuo, ĵaluzas pri la kapablo forgesi ĉiujn zorgojn almenaŭ laŭaspekte.

Aliaj, kiel mi, simple ne komprenas tiun kapablon.

Sed ne estas mia tasko, recenzi karnavalon, nek recenzi la sociajn kondiĉojn sub kiuj tia karnavalo okazas — en Brazilo aŭ aliloke. Mia tasko estas, recenzi ĉi tiujn kvar kanzonojn: Muziko kantiga kaj danciga. Tekstoj kaj melodioj tiaj, ke post nur unu-du-foja aŭdo ni jam povas partopreni la kantadon. Tekstoj kvar, el kiuj tamen du rememorigas al ni, ke la vivo ne estas karnavalo. Unu citaĵo: "Doktora moŝto, mi bezonas monon, ĉar devas solvi la semajnan manĝbezono". Citaĵo dua: "Monatan pagon gajnos mi hodiaŭ. Se mi malfruos, ĝin formanĝos inflacio". La aliaj klarigas la naskiĝon de la Karnavalo en Rio kaj prikantas faman futbaliston. Entuziasmige kantataj, entuziasme akompanataj, ĉio profesie. Bona disko por senzorga festo. Tekstoj superaj almenaŭ al la ĉi-landaj karnavalaj kantoj!

Mendu ĉe UEA: 7,20 (por Nederlando 8,49) gld., plus sendokostoj 10%.



ĈU VI ANKAŬ POR LA ĈI-JARA LIBROTAGO SUKCESOS NE DONACI AL VI MEM LA VERKON SEN KIU NE EBLAS EFIKE LABORI POR ESPERANTO?

Jam pli ol du mil personoj aĉetis ĉi tiun verkon, ĉar "... ĝi estas la plej bona kaj plej informriĉa libro iam ajn verkita pri la Internacia Lingvo." (M. Duc Goninaz)

Esperanto en perspektivo; *Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*. Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A East-combe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

24a INTERNACIA SEMINARIO DE GEJ:

Kien por la jarfino?

FACILAS veni al novaj ideoj, precipe kiam temas pri gejunuloj en la Esperanto-movado. Malfacile estas krei tradicion en la junulara medio. Kaj, tradicio ĉi tie ne signifas tiun ĉenan ligiĝon al la pasinteco, kontraŭ kiu ĝuste la junularo plej ofte ribelas. Kiam Germana-Esperanto-Junularo (GEJ) organizas jam por la 24a fojo sian Internacian Seminarion, tiam almenaŭ la nomo kaj la kontinueco de la aranĝo sonas tradicie. Multo alia pri tiuj seminarioj ŝanĝiĝis de post la unua tiunoma aranĝo, kiun en 1958 partoprenis trideko da homoj el kvar landoj. NUN la Internacia Seminario de GEJ jam de jaroj estas la plej populara kaj la plej granda junulara aranĝo post la TEJO-kongresoj.

Al kio GEJ ŝuldas la popularecon de la seminarioj? Ĉefe al la fakto, ke ĝi sukcesis adapti ĉiujn siajn novajn ideojn al la tradiciaj nomo kaj formo de la aranĝo, kaj tiel profiti el la kreiganta populareco de la seminarioj, ne perdi tempon ĉiujare diskonigadi novan eventon kaj, aliflanke, koncentri siajn organizajn fortojn kaj talentojn je la kvalito de la seminarioj. Tre gravas, ke ankaŭ la datoj de la seminarioj ne variis tra la pasintaj dudek kvar jaroj. Kvankam la fizikaj kondiĉoj de la seminarioj ne egalas inter si, preskaŭ regule temis pri junulargastejoj, kio siavice garantiis ne nur la nivelon de la komforto sed ankaŭ la nivelon de la prezoj.

Kiel antaŭ du jardekoj, ankaŭ la nuntempaj seminarioj de GEJ havas nur unu bazan temon. Multo, tamen, ŝanĝiĝis en la maniero trakti difinitan temon, kaj nek malpleniĝis nek minacas elĉerpiĝi la fonto de la aktualaj mondaj kaj movadaj temoj por ĉefroli en la seminarioj de GEJ. Tial eble ne la vario en la elekto de la temo kaj loko plej bone ilustras la aluditajn adaptiĝajn talentojn de GEJ. Io alia, unuafoje realigita pasintjare, pli bone emfazas tiun trajton de la organizantoj en Germana Esperanto-Junularo.

Por ne perdi sian publikon simple pro la aĝo, ne plu konvena al pure junularaj aranĝoj, GEJ organizis, paralele al sia 23a Internacia Seminario pasintjare, la unuan Internacian Festivalon de Mezaĝuloj. Ĉar la mezaĝuloj ofte jam estas familiaj homoj, samtempis al la seminario kaj festivalo ankaŭ speciala aranĝo por la infanoj, ia malgranda infana kongreseto. Ĉiuj tri aranĝoj sukcesis, kaj GEJ nun anoncas la samon por la fino de ĉi tiu kaj la komenco de la venonta jaro.

La 24a Internacia Seminario, la 2a Internacia Festivalo kaj la akompana aranĝo por la infanoj okazos inter la 27a de decembro 1980 kaj la 3a de januaro 1981 en Jugendburg Sensenstein, apud Kassel (FR Germanio). La nun validaj aliĝkotizoj (ili inkluzivas ankaŭ la restadon kaj la manĝojn) varias inter 130 kaj 200 germanaj markoj, depende de la aĝo. Pri detaloj skribu al: Hans-Dieter Platz, Maikammerer Str. 21, D-6731 St. Martin, FR Germanio. La temo de la 24a Internacia Seminario de GEJ estas "Alternativaj vivstiloj". Oni planas trakti diversajn aspektojn de la temo, kun aparta emfazo de: energio, agrikulturo, labormedio, sano, sociordo. Tre verŝajne al tiu temo dediĉiĝos speciala numero de la revuo de TEJO — *Kontakto*.

RENKONTIĜO EN BELGIO:

Ĉefe pri muziko

VIGLAN, sed tre malvarman, semajnfino pasigis 120 gejunuloj en semajnfina renkontiĝo organizita komune de FLEJA kaj NEJ (junularaj Esperanto-organizaĵoj de la flandra parto de Belgio kaj Nederlando). La meza aĝo de la ĉeestantoj estis sufiĉe malalta pro la ĉeesto de multaj lernejoj. La partoprenantoj venis ĉefe el Belgio, Nederlando kaj FR Germanio, sed estis kelkaj homoj el Britio, Francio, Italio kaj Kanado.

La temo de la renkontiĝo estis muziko, kio donis bonan pretekston por ĝui la kantadon de Ĵak Le Puil, por ne menci la vesperan dancadon. Krome Petro De Smedt prelegis pri kariljono (sonorilaro), kaj Fred de Geus montris vidbendan parodion de la muzikplena desegnofilmo *Fantasia*. Dum unu programero, tamen, regis ĉiam pli profunda silento: temas pri la tre interesa pantomima prezento de Myriam Geirnaerts.

Matene okazis laborgrupoj pri, interalie, kabaredo, la influo de la angla lingvo en populara muziko kaj (iom for de la temo sed tamen sukcese) juro. Pro la multaj novaj esperantistoj ĉe la renkontiĝo estis du studgrupoj por komencantoj kaj konversacia kurso por iom pli progresintaj lernantoj. Aliaj programeroj estis kvizo kaj arbaraj ludoj.

La kunveno okazis en junulara gastejo proksime de la belga urbeto Geel. Por helpi la multajn studentojn kaj lernejojn, la organizantoj strebis aranĝi ĉion je kiel eble plej malalta tarifo. Bedaŭrinde, normale ne eblas kombini malaltan tarifon kun komfortaj kondiĉoj, kio sufiĉe klare evidentiĝis dum la semajnfino.

A.B.

kontakto

Ĉu vi rimarkis, ke la abonprezo de "Kontakto" por 1981 varias inter 3,75 kaj 17250! Da kio? Nu, da mono. Dependas de tio, ĉu vi pagas vian abonon en britaj pundoj aŭ en argentinaj pesoj. Ĉiukaze, kie ajn vi estas, en Ĉilio aŭ en Kuvajto, vi bezonas "Kontakto"-n. Abonu por 1981!

Laste aperis...

Esperanto kiel revelacio, Francisco Cândido Xavier, Francisco Valdomiro Lorenz (1872-1957) k.a. Araras: Instituto de Difusão Espírita, 1976. 176p. Ilus. 19cm. Paralele portugala-Esperanta. Pri Esperanto kaj pri la ĉehdevena brazila E-pioniro F.V. Lorenz. Prezo: 2,40 gld.

Fervoja terminaro Esperanta-sveda, Harry Bengtsson. Sveda Esperanta Fervojista Asocio, 1976. 6+169p. 17cm. Ambaŭdirekta. Prezo: 10,50 gld.

Fervojoj en la basaj landoj, W. Meijnen. El la nederlanda tr. J. Ph. Punt. America: 32a IFEF-Kongreso, 1980. 17p. Ilus. 30cm. Prezo: 6,00 gld.

Floranta branĉeto; Poezio kaj prozo por infanoj, Ljuba Bojaĝieva kaj Miĥail Ĉobanov (1913-). Plovdiv/Sofio: 40a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, 1980. 66p. Multobligita. 20cm. Poemoj kaj bonhumoraj fabeloj. Prezo: 2,40 gld.

Ilustrita metodo de Esperanto, Yvon L. Séguin. Belo Horizonte: Spiritisma Grupo "EEE", 1977 (?). 123p. Ilus. 28cm. Ĉarme malnovmoda lernolibro bildoplena, kun vortareto kaj klarigoj en la portugala. Prezo: 9,90 gld.

Internacia komunikado: Aplikado de Esperanto. Red. Yves Bellefeuille (1962-) k.a. Rotterdam: TEJO, 1980. 48p. 21cm. Pri TEJO-seminario en Strasburgo, kun raportoj de Piron, Casini, MacGill, Corsetti, Darbellay k.a. Prezo: 5,10 gld.

Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj, Marinko Gjivoje (1919-). Zagreb: La aŭtoro (kunlabore kun Eldonejo Gabrielli), 1980. 56p. Ilus. 20cm. Donas detalojn pri trideko da publikaj, asociaj, sociaj kaj privataj librokolektoj, kun fotoj de multaj. Prezo: 12,60 gld.

BELA LIBRETO SPRITA HUMURO ŜERCEMA TEMPERAMENTO



William Auld:

"... ĉiu paĝo donis al mi plezuron."

El la germana lingvo tre libere kaj nur proksimume esperantigitaj de **Rikardo Ŝulco** kaj de li anekse provizitaj per pseŭdosciencia, resuma tabelo enhavanta la necesajn klarigojn, per kiuj li serioze provas konfuzi naivajn legantojn. Li kulpas ankaŭ pri la spiralaĵoj, desegnaĵoj kaj vinjetaĵoj.

Pendumilaj lidoj (1908), Kristiano Morgenŝterno (1871-1914). Gerlingen: Bleicher Eldonejo, 1980. 108p. 18cm. ISBN 3 88350 501 3. Prezo: 13,80 (por Nederlando 14,35) guldenoj. La libroservo de UEA donas rabaton de 33% ĉe samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.

Islanda Esperanto-Asocio okazigos

INTERNACIAN KULTURAN SEMAJNON

en **Stykkishólmur**, okcidenta Islando, de la 18a ĝis la 24a de julio 1981. Prelegoj kaj kursoj pri geologio, islanda kulturo, Esperanta poezio. Konversaciaj rondoj. Diversaj ekskursoj.

Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe: Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Reykjavík, Islando.

DISKO EN ESPERANTO: Impona kantato, popolkantoj, koruso, solkantistoj. Ĉiuj tekstoj sur la koverto. Tia estas la disko *Songpoemo pri ponto*, eldonita de Islanda Esperanto-Asocio. Prezo: 27,90 guldenoj. Havebla ĉe la Libroservo de UEA (kun triona rabato por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj).

Kvindek jarojn, Nikola Aleksiev (1909-). Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1980. 39p. Ilus. 21cm. Dulingva (bulgara/E-a) raporto pri Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (1930-1934), kiu likvidiĝis sub la ondo de faŝismo. Prezo: 1,50 gld.

Okdek jaroj; Esperanto-movado en Plovdiv, Kr. Sofroniev. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1980. 66p. Multobligita. 21cm. Prezo: 1,80 gld.

Omnibuso kun la tri pasaĝeroj, L', Masao Miyamoto (1913-), Masao Ueyama (1910-) kaj Ezo Saito (ilustraĵoj). Kioto: L'omnibuso, 1980. 65p. 18cm. "Postrikolta kolekto" de la konataj japanaj E-verkistoj: poemoj kaj prozpecoj de Ueyama kaj poemoj, inkluzive la komencon de la nefinita epopeo "Okinawa", de Miyamoto. Prezo: 12,30 gld.

Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto, Olav Reiersøl. Oslo: La aŭtoro (deponejo: Esperantoforlaget A/S), 1980. 91p. Multobligita. 30cm. Gramatika studo, kiu subtenas la t.n. "atismon". Prezo: 12,90 gld.

Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco. Adaptis Tang Deng. El la ĉina Beijing: Fremdlingva Eldonejo, 1980. 84p. Kolorilus. 21cm. 88-Es-157P. Bildlibra adaptaĵo de parto de klasika ĉina romano *La pilgrimado al la okcidento*, pri la aventuroj de la simio-reĝo Sun Wukong. Prezo: 3,60 gld.

Translation course in Esperanto for advanced students, A. F.R. Banham (1898-1974). Clontarf Beach: Mrs. Hilda Banham, 1979. 8+176p. 26cm. Instruas la tradukarton per ekzemploj: 110 mallongaj tekstoj (de Maugham, Hardy, Scott k.a.) en la angla kaj Esperanto. Prezo: 18,60 gld.

Trezorinsulo (1882), Robert Louis Stevenson (1850-1894). El la angla tradukis (1977) Grace Kirkwood. Glasgow: Kardo, 1980 (2a eld.). 6+181p. Ilus. 21cm. ISBN 0 905149 05 X. Aventur romano pri pirato kaj junulo, kiu aliĝas al lia serĉo por enterigita trezoro. Prezo: 17,10 gld.

Diversaĵoj:

Gluafiŝo ronda, por aŭto. Verda kaj nigra preso sur blanka fono. Kun la vorto "Esperanto" kaj verda stelo en parolnubeto. Diametro: 13cm. Prezo: 1,50 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la **minimuman mendosumon de 15,- guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,- gld.**

Irano

• Ampleksa *Esperanto-persa vortaro* aperis en Teherano en septembro ĉi-jare. La kompilinto de la verko estas Mahmud Moŝkeri, kies laboro ĉefe baziĝis sur la konata vortaro por anglalingvanoj de d-ro John C. Wells. La libro de Moŝkeri estas la unua ampleksa leksikologia Esperanta verko aperinta en Irano. Ĝi enhavas ankaŭ koncizan prezenton de la Esperanta gramatiko.

Kubo

• En septembro ĉi-jare komenciĝis en Havano novaj amasaj kursoj pri Esperanto. Temas denove pri diversnivela instruado al la komencantoj, progresintoj kaj tiuj, kiuj poste celas instrui la Internacian Lingvon. Pri similaj amasaj kursoj ni skribis en nia marta numero ĉi-jare. Tiuj kursoj daŭris de februaro ĝis junio kaj finiĝis per solenaĵo, la 1-an de aŭgusto, kiam 560 gekursanoj ricevis ateston pri la lernado de Esperanto.

Pollando

• En Krakovo, Vojevodio Esperanto-Klubo (Rynek Główny 27, PL-31-010 Kraków) preparas nekutime riĉan programon por la ĉi-jara Zamenhof-Tago: prelegoj pri la Esperanto-instruado kaj pri la krakova kultura heredaĵo, premiero de nova monodramo de Jadwiga Gibczyńska pri Zamenhof, prezento de Esperantaj filmoj ktp. Inter la 1-a kaj 23-a de decembro, en la salonegoj de la Krakova Kultur-Domo okazos granda ekspozicio de la Esperantaj libroj, gazetaro kaj afiŝoj. Eventualaj lastmomentaj kontribuoj estas bonvenaj.

Venezuelo


• La 30-an de septembro Venezuela Esperanto-Asocio inaŭguris per malgranda festo sian novan sidejon en la komerca centro de Caracas, proksime al la Centra Universitato. Dum la lastaj 8 jaroj, Esperantaj kunvenoj, aranĝoj kaj kursoj estis organizitaj en publikaj bibliotekoj. Nun la fratoj Esteban kaj Jorge Mosonyi disponigis tre taŭgan ejon al la Asocio. Sendube, tio ege helpas la laboron kaj la Esperantan agadon en Venezuelo.

• La direktoro pri kulturo de la Centra Universitato de Venezuelo en Caracas, la plej granda en la lando, kunlaboranta kun Venezuelana Esperanto-Asocio, starigis novan kurson de la Internacia Lingvo por studentoj de ĉiuj fakultatoj. La kursgvidanto estas prof. Rafael Mejía. Pli ol 60 studentoj aliĝis, la plej granda nombro ekde la komenco de tiuj kursoj antaŭ 3 jaroj.

Japanio

• Japanaj esperantistoj ofte mencias la mankon de kontaktoj kun la

eksterlandaj parolantoj de la Internacia Lingvo. Ŝajnas, ke lastatempe ne restas multaj kialoj por plendi, ĉar la vizitoj de eksterlandanoj oft-iĝis. En aŭgusto ĉi-jare Japanion vizitis Vilmos Benczik, ĉefredaktoro de *Hungara vivo*. Dum la sama monato venis ankaŭ prof. Io Chou, fama ĉina entomologo kaj esperantisto, kaj Amri Wandel (Israelo), vicprezidanto de TEJO. Ankaŭ William Harmon, prezidanto de la usona landa asocio de UEA, estis lastatempe en Japanio. Dum oktobro kaj novembro, al la eksterlandaj gastoj de japanaj esperantistoj aldoniĝis Stefan MacGill, nova direktoro de la roterdama oficejo de UEA. Kiel kutime en Japanio, ĉiu el la gastoj prelegis, ofte eĉ plurfoje kaj diversloke.



• **Ĉinio: Multaj Esperanto-novaĵoj venas lastatempe el la lando en kiu agas la plej nova landa asocio de UEA.** Tra la tuta lando fondiĝas lokaj kaj regionaj filioj de Ĉina Esperanto-Ligo, okazas multaj kursoj pri la Internacia Lingvo, al la jam bone konata kaj ĉiam pli interesa revuo "El popola Ĉinio" aldoniĝas alia — enlanda — Esperanto-periodaĵo. Ne maloftas plu eĉ gastoj el eksterlando. Niaj du fotoj estis faritaj okaze de la vizito de japana E-grupo en septembro ĉi-jare, kiam oni — evidente — kantis kaj ekskursis.

Fervojistoj

- En Oberkirch (FR Germanio), inter la 10a kaj 12a de oktobro, Germana Esperantista Fervojista Asocio festis sian 70-jaran jubileon. Krom la membroj de GEFA partoprenis ankaŭ gastoj el deko da landoj. Ĉeestis la urbestro kaj la prezidanto de Eŭropa Fervojista Unuiĝo, s-ro H. Döpfer, kiu salutis en Esperanto. Okazis ankaŭ ekspozicio, funkciis libroservo, estis aranĝita koncerto, kaj Pola Esperanto-Teatro prezentis la teatraĵon *Malfermu la pordon*. Pluraj regionaj gazetoj amplekse raportis pri la aranĝo kaj Esperanto.

Ornitologoj

- Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE), kunlaboranta faka asocio de UEA, havas ĉ. 300 membrojn, kiuj estas amatoraj birdamantoj aŭ profesiaj ornitologoj. ORE ekde 1964 eldonas 16-paĝan, grandformatan, ilustritan revuon *La mevo*. Ĝi aperas kvaronjare kaj publikigas artikolojn el ĉiuj branĉoj de la birdoscienco. La jara kotizo de ORE, inkluzive de la abono al *La mevo*, estas 25,00 (por netranspagipovaj landoj 16,00) guldenoj. Membriĝu ĉe: G.F. Makkink, Eekhoornlaan 10, 6705 CH Wageningen, Nederlando.

Kongresoj

- Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kongresis ĉi-jare, inter la 19a kaj 25a de julio, triafoje en Jugoslavio. Al la 53a Kongreso de SAT, kiu okazis en la plej granda jugoslavia havenurbo Rijeka, venis ĉ. 400 gekongresanoj el 18 landoj.

Periodaĵoj

- Fonto* estas la nomo de la nova beletra revuo, kiun eldonas Gersi Alfredo Bays en Brazilo. La ĉefredaktoro de la revuo estas William Auld, prezidanto de la Akademio. La unua numero de *Fonto* aperis komence de oktobro. Ĝi estas 42-paĝa (15,5x21 cm), bele kompostita kaj presita, ilustrita. Inter dudeko da kontribuintoj al la unua numero troviĝas ankaŭ Waringhien, Boulton, Dresen Kuroda, Chaves, Patrinu, Heide, Knoedt, Lister, Konstantinova kaj

Auld mem. *Fonto* promesas aperi ĉiumonate. La abonprezo estas 15 usonaj dolaroj.

Literaturo

- Sesdek ses abonantoj de *Literatura foiro* kaj *Kontakto* partoprenis la voĉdonon por la elekto de la "Verko de la Jaro 1979". Po 17 voĉojn ricevis la verkoj *Ĉu li bremsis sufiĉe?*, romano de J. Valano, kaj *La turoj de l' ĉefurbo*, diversĝenra kolekto de Mauro Nervi. Tiuj du libroj, do, gajnis la konkurson, kies rezultoj diskoniĝis dum la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Rauma, Finnlando, fine de julio.

Libroj de J. Régulo

- Kiel konate, la iama ĉefa eldonisto de la Esperanta beletro, prof. Juan Régulo Pérez, el La Laguna (Kanariaj Insuloj), jam de pluraj jaroj, pro

profesia okupiteco, ne reagis al la mendoj de la movadaj librovendejoj, kvankam multaj el preskaŭ cent titoloj de la Stafeto-libroj ankoraŭ ne elĉerpiĝis. Eta "miraklo" tamen okazis. Nun la Libroservo de UEA disponas pri grandaj kvantoj de jenaj Stafeto-libroj: *La arbo de la sciado* (Baroja), *Ekzilo kaj azilo* (Emba), *El tero kaj etero* (Pióro), *Esploroj* (Ragnarsson), *Fajro sur mia lango* (de Kock), *La infana raso* (Auld), *Jozefo* (Applebaum), *Ni devas vivi* (Gabrielli / Walraamoen), *Sub stelo rigida* (Th. frá Hamri, tr. Ragnarsson), *Vesperkanto* (Adamson) kaj *Vojo kaj vorto* (Nogueira). Venis ankaŭ malgranda kvanto de *Ni kaj ĝi* (Waringhien) kaj *Tragedio de Otelio* (Shakespeare, tr. Rossetti). Grava novaĵo estas, ke la Libroservo de UEA, ekde nun, donas trionan rabaton por ĉiuj disponeblaj eldonaĵoj de J. Régulo, kondiĉe, ke oni samtempe mendu minimume tri ekzemplerojn de la sama titolo. Tre verŝajne, post iom da tempo disponeblos denove ankaŭ la aliaj titoloj de la Stafeto-libroj.

Persone

Kindler

- Hansjörg Kindler, komitatano de UEA kaj de pluraj jaroj la ĉefa movada aktivulo en Luksemburgo, flugos baldaŭ al Hinda Unio kaj Ĉinio. "Triksini", kiel Kindler estas pli bone konata en la Movado, planas resti dum kelkaj monatoj en Azio kaj tie prelegi, instrui, varbi kaj — kompreneble — ankaŭ prezentadi sian magiistan programon. Kindler faris tre sukcesan turneon tra Svedio, post la 65a Universala Kongreso en Stokholmo.

M'Bow

- La 27an de septembro, la 21a Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazinta en la jugoslavia ĉefurbo Beogrado (vidu raporton pri ĝi aliloke en ĉi tiu numero), unuanime reelektis s-ron Amadou-Mahtar M'Bow, por plia sepjara mandato, ĝenerala direktoro de Unesko. Tiu unuanimeco, tiel malofta en la nuntempa internacia vivo, estas persona triumfo de la homo, kiu sukcesis en siaj klopodoj, ke "dialogo kaj kunlaboro anstataŭu la konfrontiĝon" en la nuna mondo. Ankaŭ la Espe-

ranto-movado salutas tiun reelekton, i.a. pro la klaraj simpatioj, kiujn s-ro M'Bow esprimis pri la Internacia Lingvo. Efektive, okaze de la reelektiĝo d-ro Tonkin sendis al s-ro M'Bow gratulelegramon al kiu la ĝenerala direktoro de Unesko respondis jene: "Mi profunde aprezas la gratulmesaĝon, kiun vi sendis okaze de mia reelektiĝo. Mi esperas vidi la kunlaboron inter Unesko kaj Universala Esperanto-Asocio fortikiĝi en la estonteco."

Tyblewski

- D-ro Tyburcjusz Tyblewski el Pollando faris prelegvojaĝon en Nederlando inter la 27a de oktobro kaj la 6a de novembro ĉi-jare. Li prelegis en ses diversaj lokoj, inkluzive de Amsterdamo, Hago kaj Roterdamo. Preskaŭ ĉiu prelego havis alian temon (Tolstoj, Esperanta literaturo, Pollando, interpersonaj rilatoj, personeco de esperantisto). D-ro Tyblewski, kiu estas psikologo, verkis la studon *Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto*; ĝi aperis en la Esperanta kaj anglalingva serioj de *Esperanto-dokumentoj*.

MAURICE GENEVOIX (1890-1980), romanisto, honora sekretario de la Franca Akademio, granda amiko de la Internacia Lingvo, lastatempe forpasis. Li je diversaj okazoj donis helpon al la franca Esperantomovado. Dum radia intervjuo en 1959 li diris: "Esperanto tute ne estas unuforma, robota lingvo sed, male, lingvo natura kaj fleksebla. . . . Esperanto kapablas esprimi la plej subtilajn nuancojn de pensoj kaj sentoj; ĝi sekve ebligas esprimigon maksimume ĝustan, literaturan kaj estetikan, kaj povas kontentigi la plej ofendigemajn, la plej detalemajn homojn; ĝi ne povas ofendi la fidelulojn de la naciaj lingvoj."

JAKOB SCHENKEL (1892-1980), esperantisto ekde 1910, forpasis la 5an de oktobro en Gersweiler (FR Germanio). Li kunfondis Saarlandan Esperanto-Asocion (nun Sarlanda Esperanto-Ligo) kaj servis ĝin en pluraj oficoj. Li lingve reviziis la unuan romanon de H. Bulthuis (*Idoj de Orfeo*, 1923), kuntradukis la broŝuron *Volo kaj vojo en Saarlando* (1951) kaj verkis la skizon *Esperanto en la Saar-regiono* (1961).

OSWALDO ARRUDA STEIN (1908-1980), fondinto de Esperanto-societo en Cravinhos (Brazilo), mortis en julio en San-Paŭlo. Li aktivis pri Esperanto dum pli ol kvindek jaroj.

HONORÉ BOURDELON (1892-1980), multjara delegito en Marsejlo (Francio), mortis la 21an de septembro. Li prezidis la Lokan Kongresan Komitaton de la 42a UK (1957) en Marsejlo.

CHARLES TINGLE (1891-1980), kiu dum pluraj jaroj servis kiel delegito kaj fakdelegito en Alfreton (Britio), mortis la 23an de septembro en Somercotes.

KNUT JENSIE (1894-1980), kiu kunfondis la Esperanto-klubon de Jönköping (Svedio) kaj ĝin multjare prezidis, forpasis la 9an de aŭgusto. Lin ekinteresis pri la Internacia Lingvo la konata hinda esperantisto Lakshmiswar Sinha dum prelegvojaĝo en 1930.

JOHANO MATASIN (1899-1980) mortis la 2an de aŭgusto en Sidnejo (Aŭstralio). Lerninte la lingvon en Jugoslavio en 1908, li enmigris Aŭstralion en 1928. Li estis inter la fondantoj de kooperativo, kiu havigis domon en Sidnejo al la Esperantomovado, kaj dum dudek jaroj deĵoris tie kiel direktoro. Dum multaj jaroj li estis delegito de UEA en Sidnejo.

IVAN THEODORE MADDERN (1906-1980), kiu prezidis Aŭstralian Esperanto-Asocion en 1966 kaj 1967, mortis en Morwell (Aŭstralio), la 28an de julio. Kiel lernejestro li multe aktivis en la eduka reformmovado, kaj cetere agadis por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. En la lastaj jaroj li iniciatis internacian grup-leteron, kiun fine partoprenis esperantistoj el kvardek landoj.

IJNTJE PALS KINGMA (1891-1980), multjara membro, delegito kaj fakdelegito de UEA en Bergum (Nederlando), forpasis frue en septembro.

JORGE HESS (1902-1980), kunfondinto de Argentina Esperanto-Ligo, mortis la 30an de julio en Wilde, Argentino. Lia verko *¿Sabe Usted Esperanto?* (1956; 5a eldono 1977) restas inter la plej popularaj hispanlingvaj lernolibroj, kune kun *Curso práctico de Esperanto* de Ferenc Szilágyi, kiun Hess adaptis por hispanlingvanoj en 1949. Li kompilis la verkon *Paperoj de Wappers* (1969). Hess dum kelkaj periodoj estis redaktoro de *Argentina esperantisto*.

FRANK TICHÝ (1926-1980), oficisto, mortis en Šlapánov (Ĉeĥoslovakio) la 18an de marto. Li lernis la Internacian Lingvon en sia junaĝo kaj poste aktivis i.a. kiel kursgvidanto kaj multjara delegito de UEA.

PAUL HEINRICH (1880-1980), membro de la grupo en Wiesbaden (FR Germanio), forpasis la 19an de junio, tri monatojn antaŭ sia centa datreveno.

EŬGENO AISBERG (1905-1980) forpasis la 4an de oktobro en Parizo. Aisberg ĉi-jare fariĝis honora membro de UEA, grandparte pro sia verko *Fine mi komprenas la radion!*, kiu aperis unue felietone en *Internacia radio-revuo*, kiun li fondis en

N-ro 539

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: M. Delforge. Francio: N.N.
FR Germanio: R. Fössmeier. Korea Respubliko: Gim Jong-Ĝin; In Jong-Ĵin; Ĵong Sun-Te; Ŝin Ĵong-Te.

SOCIETO ZAMENHOF 1980

ARG: 218 Curt Julio Milkuschütz.
JAP: 219 Katoo Iwao. JUG: 220 Bogomir Marković. NED: 221 J. Dunnewold-Ehrmann. SVED: 222 Erik Carlén.

Antaŭdankon pro la frua pago de via kotizo por 1981! Tiel vi helpas la laboron de la Centra Oficejo.

DONACOJ 1980 (Gld.) ĝis la 30a de septembro

ELDONA FONDAĴO: Institucio Hodler 1 000,00. Sumo ĉi-jara 1 027,84.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Institucio Hodler 1 500,00. Sumo ĉi-jara 7 676,36.

FONDAĴO CANUTO: Argentino: R. Díaz Morilla 50,00. Institucio Hodler 3 000,00. Sumo ĉi-jara 5 049,98.

FONDAĴO TEJO: Svedio: Eldona Societo Esperanto 183,35. Sumo ĉi-jara 835,21.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: J. Eder 357,13. Japanio: Anonima 200,00. Diversaj malgrandaj 9,79. Sumo ĉi-jara 3 253,38.

PATRONOJ DE TEJO: 36 A. Orsolini, Belgio. 37 J. Wilson, Nov-Zelando.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA



1925, poste (1934) en libroformo.

Ĝi estas verŝajne la plej tradukita Esperanta originalaĵo ĝis nun aperinta, kun eldonoj en dudek naciaj lingvoj. Filo de rusa profesoro kaj aŭstra patrino, li naskiĝis la 10an de septembro 1905 en Odeso, sed translokiĝis al Parizo en 1925. Multaj verkoj liaj pri radio, televido kaj elektroniko aperis en la franca. De post 1958, li estis prezidanto de la Internacia Unuiĝo de la Radioteknika kaj Elektronika Informado kaj honora membro de la Instituto de Elektra kaj Elektronikaj Inĝenieroj.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 36

(pri la demando vidu nian numeron de oktobro 1980)

1. En 1889 estis eldonita de d-ro Zamenhof en Varsovio *Internationelt Språk – Företal och Fullständig Lärobok*, la "Unua Libro" de d-ro Esperanto, tradukita en la svedan lingvon de Gustaf Henriclundquist (1865-1930), juna studento el Ystad, Skanio.

2. Post la ĉeso de *La esperantisto*, nova periodaĵo kun la titolo *Lingvo Internacia* aperis en 1895 en Uppsala, urbo kiu fariĝis la tiutempa organiza centro de la Esperanto-movado pro la aktiveco de la tiea Klubo

Esperantista, fondita en 1891. Vladimir Gernet el Odeso estis la mecenato kaj direktoro de *Lingvo Internacia*, kaj la ĉefaj redaktoroj estis Valdemar Langlet (1872-1960) kaj Paul Nylén (1870-1958).

3. Ernfrid Carl Malmgren (1899-1970), instruisto, esperantistiĝis en la 1920aj jaroj, funkciis kiel estraro de UEA (1934-1956), vicprezidanto de Internacia Esperanto-Ligo (1938-1947) kaj la unua prezidanto de la reunuigita UEA-IEL ekde 1947. De 1962 ĝis 1970 li estis honora prezidanto de UEA.

4. La 8a Internacia Kongreso de la laborista organizaĵo SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) estis aranĝita en Gotenburgo en 1928 kun la helpo de la ĉefaganto de la laborista movado en Svedio, Einar Adamson (1894-1953). Ĉeestis 500 kongresanoj. La ĉefa evento dum la kongreso estis la minaco de skismo en SAT pro la atako, kiun Ernest Drezen lanĉis kontraŭ E. Lanti, la fondinto de tiu organizaĵo.

5. La 13a kongreso de SAT, kun 600 gekongresanoj el 16 landoj, okazis en Stokholmo en 1933. La partoprenantoj aŭdis la abdikandeklaron de la fondinto de SAT, E. Lanti, kiu pro atakoj kaj kalumnioj ekŝiĝis de la prezidanteco por entrepreni mondvojaĝon kaj dediĉi sin al studado kaj verkado.

6. En 1934 la sveda ĉefurbo gastigis la 26an Universalan Kongreson de UEA. Partoprenis 2 042 anoj el 34 landoj. La prezidanto de la kongreso estis Teodor Julin, poŝta funkciulo kaj parlamentano.

7. Dek kvar jarojn post la 26a Universala Kongreso de UEA, en 1948 denove okazis Universala Kongreso en Svedio, la 33a, en la urbo Malmö. La nombro de kongresanoj estis 1 761, kaj la prezidanto de la kongreso estis Jan Strönnne.

8. Ses fojojn, en 1953, 1954, 1956, 1959, 1962 kaj 1972, Svedaj Some-

raj Semajnoj estis organizitaj en Frostavallen apud Höör. Ili estis kulturaj aranĝoj kun prelegoj, diskutoj kaj studrondoj. En 1956 kunvenis reprezentantoj de informaj fakoj por pritrakti la informadon pri Esperanto. Iliaj konkludoj estas "Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo", pli bone konata kiel la *Principaro de Frostavallen*.

9. En Borås en 1967 mortis Ferenc Szilágyi, kiu naskiĝis en Budapeŝto en 1895. Li esperantistiĝis en 1924, venis al Svedio en 1932 por gvidi Esperanto-kursojn kaj definitive ekloĝis en la lando, fariĝante sveda civitano. Inter liaj multflankaj literaturaj agadoj estas menciindaj la fondo kaj redaktado de la kultura revuo *Norda prismo* (1955-1967) kaj kvin *Rapsodioj*, kolektoj de prozo kaj poezio originala kaj tradukita (1943-1953). Szilágyi tradukis 20 novelojn de 16 svedaj aŭtoroj en la kolekto *Sveda novelaro* (1950).

10. Okaze de la 25a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) en 1969 en Tyresö, estis akceptita deklaracio, kiu malaprobas lingvan kaj kulturan diskriminacion.

DEMANDO 37

(la respondo aperos en nia decembra numero)

Kvankam tiu ĉi demando temas pri financaj aferoj, ĝi interesos ne nur la kasistojn de Esperanto-kluboj. Mono diversmaniere rolis en la historio de Esperanto, kiel montras la sekvaj dek demandoj. Ĉu vi scias la kvanton kaj la valuton?

1. Kiom estis la doto, kiun d-ro Zamenhof ricevis en 1887 okaze de sia edziĝo al Klara Silbernika, kaj pri kiu li disponis antaŭ la edziĝo por povi eldoni la "Unua Libro"?

2. Kiom kostis la "Unua Libro" de d-ro Esperanto, kiu estis eldonita en Varsovio en 1887?

Transformu la vortan apogon de solidareco en solidaran agon. Kiam vi pagos vian kotizon por 1981, pensu pri la Fondaĵo Canuto kaj pri miloj da homoj, kiuj pagus, se ili povus. Faru kontribuon al la Fondaĵo! Dankon.

3. Kiom da mono donis d-ro Zamenhof en 1888 al sia patro, Marko Zamenhof, kiam tiu perdis sian oficon de cenzuristo kaj devis subaĉeti korupteblajn rusajn burokratojn por eviti punon kaj daŭrigi sian instruistan laboron?

4. Kiam la gazeton *La esperantisto* trafis financa krizo, kiom da mono donis la germana mecenato W.H. Trompeter al d-ro Zamenhof kiel monatan salajron por redaktado de 1892 ĝis 1894?

5. Kiom da mono proponis al Zamenhof en 1906 la franca okulkuracisto Emile Javal kaj la belga oficiro Charles Lemaire, por ke la aŭtoro de Esperanto enkonduku modifojn en la lingvon?

6. Kio estis la valoro de la speso, internacia fiktiva monunujo, kiu estis elpensita de la svislanda esperantisto René de Saussure en 1907?

7. Kiam René de Saussure organizis en 1911 la konkurson titolitan "Kia estas la logika senco de l' vorto 'grando'?", kiom da mono li proponis al la persono, kiu montros, ke la Ido-sistemo de vortkonstruo estas supera al la Esperanta?

8. Kiam en 1974 oni komencis fari paŝojn por reaktivigi Universalan Ligon, fonditan de s-ino Julia Isbrucker kaj pastro Andreo Cseh, ankaŭ ĝia internacia monunujo, la

LA KURZO DE LA STELO EN 1981

Jam ni povas anonci por 1981 la kurzon de nia internacia valorstabila mono-kalkulunujo, la STELO. Ankaŭ en 1981, kiel en la nuna kaj la pasinta jaroj, la referencovaluto estos la nederlanda guldeno. Nur por tiu valuto oficiala Stelokurzo estas anoncata. En la n -a tago de 1981 la nederlanda guldeno egalvaloros al $[1,720 - 0,12(n-1)/365]$ STELOJ kaj al g unuoj de iu alia konvertebla valuto, kaj 1 STELO egalvaloros en tiu tago al

$\frac{g}{v [1,720 - 0,12(n-1)/365]}$ unuoj de iu konvertebla valuto V , se en tiu tago en via lando la mezaj **kambiaj** kurzoj de la nederlanda guldeno kaj de la valuto V estas respektive g kaj v . (Se la valuto V estas la nederlanda guldeno, $v = g$, kaj se la valuto V estas vialanda valuto, $v = 1$.) La meza kurzo estas tiu, kiu estas meza inter la vendokurzo kaj la aĉetokurzo. Pri la kambiaj kurzoj (ne la kurzoj por bankbiletoj!) informiĝu per la ĵurnalo aŭ ĉe banko. Per la ĉi-supra formulo vi povos facile kalkuli kiom da kiu ajn konvertebla valuto respondas al difinita, en Steloj esprimita sumo, kiun vi devas aŭ deziras pagi. Notu en via notlibro la ĉi-supran formulon kaj la signifojn de la literoj n , g kaj v , kaj saĝe estas konservi ĉi tiun numeron de "Esperanto". Por Universala Ligo, la kasisto: W.P. Roelofs.

stelo, estis revalorigita. Kiom ĝi valoras en la mono de la lando, kie troviĝas la sidejo de Universala Ligo?

9. Kiom valoras poŝtmarko eldonita en 1979, surhavanta bildon de la varmaera balono "Esperanto" kaj tekston en Esperanto pri la 64a Universala Kongreso de Esperanto?

10. Kiom valoras monero kun la portreto de d-ro Zamenhof, emisiita de la Pola Nacia Banko en 30 000 ekzempleroj en 1979?

Interesitoj pri NIFOj bonvolu kontakti kun s-ro Leonardo de Sá, Caixa Postal 72, BR-45660 Ilhéus (BA), Brazilo.

Iranano volas korespondi kun junaj nederlandanoj: Reza Khashaiar, Sattar Khan Ave., Shadmehr St., Golbar Alley No. 6, Tehran, Irano.

Pri moderna muziko, filmoj kaj aliaj landoj volas korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn kun junaj esperantistoj f-ino Ilona Zaspalova (18-jara), Hlavacovska 1417, CS-26901 Rakovník, Ĉeĥoslovakio.

20-jara hindo, studento pri fiziko, volas korespondi kun skandinaviaj esperantistoj. P.J. Walter Joseph, XLI/1193 St. Benedict's Road, Cochin-18, 682 018 Hinda Unio.

33-jara esperantisto serĉas korespondantojn en la tuta mondo pri elektroniko, tekniko, moroj de aliaj popoloj, poemoj kaj proverboj kaj multaj aliaj temoj. Hans Joachim Krieg, Kloster-Str. 11, DDR-49 Zeitz, Germana DR.

1981: Internacia Jaro de la Handikapitoj. Plifaciligu la kontaktojn kun ili, legante kaj donacante *Ne tiel sed ĉi tiel* (pri blinduloj) kaj *Ĉu ne eblas ĉi tiel?* (pri move handikapitoj), kun spritaj ilustraĵoj. Ĉe la libroservo de UEA po 2,70 gld.

Daŝgupto decembre transloĝiĝas al: Linguistics Department, Deccan College, Pune 411006, Hinda Unio.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke ni ne donas rabaton pro la ripetado de la anoncetoj.

Por ekspozicio, por honori 60-jaran jubileon, bonvolu sendi modernajn kristnaskajn kaj novjarajn poŝtkartojn al Esperanto-societo Antaŭen, Teivaalantie 85, SF-33400 Tampere 40, Finnlando.

Alvoko: Ni planas fondi internacian ligon de pentroartistoj. Interesitoj skribu al: s-ino Maria Almada, Rua Galeão Carvalhal 31/73, BR-11100 Santos (SP), Brazilo.

Kvardek gelernantoj deziras korespondi kun la tuta mondo, pri io ajn, por perfektigi la lernadon. Adresu al: Esperanta kurso, Caixa Postal 1701, BR-80000 Curitiba (PR), Brazilo.

Tutmonda Esperantista Adresaro: Ĉiu esperantisto, ĉiuj esperantistaj asocioj, entreprenoj ktp. aperigu siajn adresojn en TEA — tio kostos neniom al ili! Vi devas nur plenigi kaj resendi respondilon, kiun ni sendos al vi kontraŭ unu internacia respondkuponon. Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Esperanto en radio: Ĉu vi legis la artikolon "Kiel argumenti por pliaj elsendoj?" en la aprila revunumero? Rigardu al tiu teksto kaj, se la dua cifero de via poŝtkodo, bankkonto aŭ pasporta numero estas 1, bonvenus, ke vi nun skribu pri Esperanto-elsendoj al kelkaj radio-stacioj. Ek!

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO
De 60 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 15,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (30,00 guldenoj; por Nederlando 31,20 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/37

Dum daŭras la melkado el la monuoj de la amaso da politikaj klientoj ĉiulandaj por defendelspezoj, same daŭras la tria mondmilito — en sia gvata fazo. Jam sufiĉus hazarda fajrero por transformiĝi en kolosan fajregon. AVERTO al la politikaj gvidantoj ĉiuspecaj: La forigo de defendelspezoj praktike ne eblas ĝis la akciuloj de la komuna posedaĵo Tero estos SUPER-DEMOKRATE kunordigitaj.

Ŝajna realigo, kiel jam okazis per starigo de Unuiĝintaj Nacioj, sufiĉus nur por daŭrigi la aktualan tragedian situacion de la Homaro.

♦ Esp/38


La libereco absoluta favoras nur la lupojn (home vestitajn), malfavorante la enorman gregon de la socia ŝafaro. Tial la grego, ripetante sencerbe la postulon por senbrida libereco, agas kontraŭ sia propra intereso.

Senbrida libereco estas dolĉa, alloga, bela — sed ve al la ŝafoj, kiuj ĝin proklamas! Morgaŭ ili rikoltos la fiajn konsekvencojn de tiu stulta ago. Ĉiu libereco senmiksa naskas krimojn; nur kiam ĝin alojas la socia matureco de la unuopulo, ĝi donas pozitivajn fruktojn.

♦ Esp/39

”LA BIBLIO de la kliento politika” estas eldonpreta jam de dek jaroj. Tamen ĝis nun mankas la mono por ĝin presigi.

Tiu libro enhavas la detalajn orientigojn por la konduto socia kaj politika por la nespertulo, kiu volas saĝe konduti en la politika arto, t.e. ne malutilante al si mem, nek al siaj proksimuloj, per decidoj for de la propra fako kaj grado de efektiva kompetenteco.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIO

EL POPOLA ĈINIO

**BONA INFORMO
20% DA RABATO**

La abonvarba kampanjo de *El Popola Ĉinio* por 1981 jam komenciĝis. Ekde 1980 10 15 ĝis 1981 01 31 estas ĝia periodo kaj dume farante abonon aŭ reabonon al la gazeto oni povas profiti 20%ojn da rabato el jena tarifo. Ne perdu la ŝancon, tuj abonu kaj varbe abonigu viajn parencojn kaj amikojn! Kiel abonvarbanto vi povos ricevi de la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian ĉinstilajn rekompencojn.

Abontarifo:

12 n-roj (1 jaro)	£3,00	US\$ 6,00	Gld. 12,60
24 n-roj (2 jaroj)	£5,00	US\$10,00	Gld. 21,00
36 n-roj (3 jaroj)	£7,50	US\$15,00	Gld. 31,50

Tuj abonu ĉe: Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

**KIU ESTAS LA PLEJ FAMA
KRIMINAL-VERKISTO?**

Kia demando! Kompreneble
JOHÁN VALANO

Tion ja scias ĉiu. Sed ĉu vi scias ankaŭ, ke en 1981 vi povos legi kriminal-novelon de Johán Valano en ĉiu numero de

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj jare. Jarabono 49,50 gmk aŭ 800,- bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (52,50 gld.; por Nederlando 54,60 gld.). Kion krom noveloj de Valano vi povas legi en **Monato**, vi vidos petinte provekzempleron kontraŭ du internaciaj respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

Baldaŭ realaĵo kaj raraĵo

Jam aperis naŭ volumoj (1 ĝis 8, plus 1bis) en la versajne plej granda unuopa eldonprojekto en la historio de la Internacia Lingvo:

iam kompletigota plena verkaro de zamenhof

Spite la grandecon de la laboro, la kvalito de ĉi tiu eldonserio instigis prof. G. Waringhien skribi jenon: "Krom la originalaj eldonoj. . . la baza, plej fidinda kaj enhavriĉa eldono estas tiu de Ludovikito. . ."

1. *unuaj libroj por esperantistoj* (1887-1888), 156p. 36 gld.
- 1bis *la inkunabloj de esperanto* (1887-1889), 283p. 36 gld.
2. *ni laboru kaj esperu!* (1887-1891), 324p. 36 gld.
3. *antaŭen al la laboro!* (1892-1895), 344p. 36 gld.
4. *tamen la afero progresas!* (1896-1900), 414p. 36 gld.
5. *hebreo el la geto* (1859-1901), 455p. 36 gld.
6. *kun gradaj paŝoj eksterlanden!* (1901-1904), 427p. 36 gld.
7. *klopodis organizi, sed vane!* (1905-1906), 443p. 39 gld.
8. *por kaj kontraŭ reformoj!* (1907-1908), 383p. 39 gld.

Ankoraŭ aperontaj estas: *mortinta, sed senmorta!* (1909-1917), *postrikolto de ludovikaĵoj kaj* — kvarvoluma kolekto de la zamenhofaj tradukaĵoj.

Se vi atendas la aperon de la du lastaj volumoj, vi riskas la elĉerpiĝon de la jam eldonitaj. La eldonkvanto estas nur 999 ekz.

MENDU TUJ ĈE LA LIBROSERVOJ DE UEA, JEI, KLEG!

